

LA ONDA de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2010

8-9

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2010. №8-9 (190-191)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefona (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2010

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara *Ondo*.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetado.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2010.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2010, №8-9 (190-191).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 22 августа 2010 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Bruliga somero en Kaliningrado



La somero ne estas politike laktiva periodo ankaŭ en nia ne tre politike aktiva teritorio ĉe la Balta bordo. Tamen ĉi-jare la varmega sezono ne kondukis la publikon al socia siesto. Serio da mitingoj jar-komence indikis seriozajn streĉojn interne del popola vivo kaj la severa (por ne diri — brutala) reagado de la ŝtatpotenco nur alportis dinamikon en la testudan pason de la politikaj procesoj: sekvis serio da protestaj pikedoj centre de Kaliningrado, kaj (signo de certaj ŝanĝoj) aktivuloj de strata opozicio komencis gajni unu post alia siajn juĝajn aferojn kontraŭ la policista teroro. La streĉo kulminis perspektive de granda mitingo, okazonta la 21an de aŭgusto, kies organizantoj anoncis la regionan guberniestron Georgij Boos la ĉefa celo de sia atako.

Boos estas forta iritstimulo de la ĉi-loka popolo. Ambicia moskvano, membro de la Kremlo teamo, li importis en la regionon avidajn metropolajn klanojn kaj provokis perturbojn en la interna ekvilibro de la politikaj kaj ekonomiaj fortoj.

La intrigo de la kazo de Boos konsistis en la ordo de la reelektado del guberniestro. Ĝuste en aŭgusto finiĝis la jarkvino de lia regado, kaj nun, laŭleĝe, la reganta partio (“ursoj” aŭ “Unueca Ruslando”) devis proponi siajn kandidatojn por la guberniestreco al la prezidento Medvedev. Je unu semajno antaŭ la mitingo tute subite la lokaj “ursoj” prezentis sian kandidatan liston sen la nomo de Georgij Boos.

Iom perpleksaj unuamomente, la mitingontoj ne rifuzis la kunvenon, donante al ĝi pli abstraktajn kritikajn sloganojn celantajn la monopolon de unu politika partio (UR) kaj unu politika persono (Putin). La atakoj kontraŭ Putin, tre modestaj jar-komence, iĝis ĉiam pli fortaj paralele kun la evoluo de nova regiona politika organizaĵo: Komitato de Socia Memdefendo. Disvolvita en horizontala dimensio, tiu “mobila” asocio kumulis la plej radikalajn elementojn de la protesta amalgamo kaj sciopovis fari la sloganon de la demisio de Putin ŝlosila vorto de politika renoviĝo.

Kiel lastkomente, mi skribas ĉi-vortojn unu tagon antaŭ la 21a de aŭgusto kaj povas nur aŭguri pri la eventuala bilanco de tiu kun- kaj kontraŭstaro en la politika zenito de nia bruliga somero sen siesto.

Alen Kris

La somero varmis ankaŭ en Esperantujo. Al la varmego de l' naturo (en la norda hemisfero) aldoniĝis la varmego etoso en la esperantistaj renkontiĝoj. Kiel kutime la duobla post-kongresa *Ondo* enhavas multajn raportojn kaj fotojn pri la kongresa sezono, inkluzive de la surkovrila foto de Radojica Petrović pri la Konferenco de ILEI en la varmega Kubo.

La kongreso en Kubo: Malriĉa sed funkcia

95a Universala Kongreso de Esperanto
Havano, 17–24 jul 2010



La 95a Universala Kongreso en Havano estis unu el plej malgrandaj dum la postmilita periodo, kvankam ĝi superis la kongresojn en Portland (1972) kaj Vancouver (1984). Tamen la unua kongreso en Havano en 1990 estis pli granda, tiam estis 1617 registritaj kongresanoj, dum nun estis nur 1002. El tiuj ĉ. 180 estis kubanoj, malpli ol en 1990. Unu el la kialoj estis, ke malfacilis kaj multekostis, kompare al la malgranda enspezo, veni al Havano el aliaj partoj de Kubo. Kelkaj kubaj kongresanoj eĉ tranoktis en la oficejo de Kuba Esperanto-Asocio. Laŭdire salajro de kubanoj estis malpli ol cent eŭroj monate, eble nur kelkdek eŭroj. Unu hotela nokto kostus du monatajn salajrojn. Ankaŭ la kongresa libro estis senteble magra kompare kun pasintaj jardekoj — nur 96 paĝoj anstataŭ la kutimaj 128 aŭ 144 paĝoj dum la pasintaj jaroj.

Mi ne ĉeestis la antaŭan UK-on en Kubo en 1990, sed surbaze de la rakontoj, la lando multe ŝanĝiĝis. Turismaj organizoj estis multe pli profesiaj ol en 1990: ne estis grandaj problemoj kun hoteloj, kvankam deko da kongresanoj, kiuj mendis la apudkongresejan hotelon

Palco, devis tranokti unuajn du-tri noktojn en alia hotelo. Ankaŭ transporto al pli foraj kongresaj aranĝoj okazis ĝenerale sen problemoj kaj malfruoj. Lokaj esperantistoj ricevis laŭdojn pro organizo kapablo. Mi plej spertis la laboron de antaŭkongresaj kaj ekskursaj gvidantoj: ili estis vere profesiaj. Tamen la malriĉeco de la lando kaj homoj havis ankaŭ sian influon al organizado: laŭdire unu ĉiĉerono svenis dum la ekskurso ĉar ŝi/li ne matenmanĝis, kaj la ekskurso devis viziti malsanulejon survoje.

La atmosfero en la kongresejo estis trankvila. Kontrolo ja estis kiel en ĉiuj kongresejoj, sed malpli rigora ol ekzemple en Pekino. Kubanoj libere rakontis pri ĉiutagaj problemoj, sed opozicia sinteno ne estis videbla.

La usona salutanto ricevis la plej fortan aplaŭdon dum la malfermo. La kialo por tio estis la malpermeso de la usona registaro viziti Kubon sen aparta permeso, kiun povis ricevi nur apartaj grupoj kiel universitatoj. La salutanto forte kritikis tiun praktikon. Nur tri usonanoj aperis en la kongresa libro, kvankam troviĝis almenaŭ deko da usonanoj en la kongresejo. Eventuale usonano, kiu

vizitas Kubon sen permeso, povas riski relative grandan monpunon.

Tamen eĉ la rektoro de la kongresa universitato estis usonano, kun oficiala permeso viziti Kubon, Humphrey Tonkin. La kialo estis, ke mankis kubano, kiu povus, aŭ havus tempon, rektori kaj sekve la serĉado iris al najbaraj landoj. Krome, du usonaj prelegantoj de IKU tute ne alvenis pro similaj problemoj. Unu el ili, eksa kubano, havis problemojn ambaŭflanke, ĉar lia kuba pasporto malnoviĝis. Tamen tiuj prelegoj, aŭ almenaŭ unu el ili, estis faritaj de aliaj, surbaze de senditaj tekstoj.

Temis pri elektojaro kaj la nova estraro estis elektita, tamen nur kun unu vere nova estrarano, Stefano Keller. Du aliaj novaj estis estraranoj iam pli frue. Tamen la ĉefa novaĵo en movada politiko estis la nedaŭrigo de la kontrakto kun la redaktoro de *Esperanto*, Stano Marček. Temis pri la lasta decido de la malnova estraro, kiu ne estis unuanima, kaj tio kaŭzis etan skandalon en la kongreso, kie defendantoj de Marček kolektis subtenon por la redaktoro. Krome en la komitato aperis diskuto pri la buĝeta politiko de UEA, tamen, iom mirige, praktike mankis diskuto pri la strategia plano, kio ja devus esti tiu ero, kie oni diskutu pri estontaj buĝetoj. Ja ĉiukaze necesus akcepti buĝeton por jaro 2011, alikaze necesus aŭ perpoŝta voĉdonado aŭ la asocio restus sen buĝeto dum la unua duono de la venonta jaro.

Ankaŭ la kultura programo estis relative magra. Aparte la eksterkuba programo. Unu el la perloj estis Esperanta versio de *Canto General*, kiun prezentis origine franca, sed internaciigita, Esperanta grupo *Interkant'*. Kuba kultura programo estis eble pli riĉa ol kutima nacia kultura programo. La nacia vespero temis plene pri muziko, grava por Kubo, sed eble la kuba kulturo enhavus ankaŭ ion alian por prezenti. Eventuale temis pri neceso ŝpari kostojn. Nu, ankaŭ la kongresa rezolucio estis rekorde mallonga.

Mi partoprenis ankaŭ antaŭkongresan vojaĝon en Kubo kaj havis eblecon

UEA: Elektoj en Havano

La Komitato de UEA la 17an de julio en Havano voĉdonis per sekreta baloto pri la proponoj de la Elekta Komisiono, kiujn ĝi ricevis en majo. Unue estis elektitaj komitatanoj C. Ĉiuj ses kandidatoj sukcesis en la voĉdonado: Loes Demmendaal, Paulo Branco, Jean Codjo, Josep Franquesa Sole, Stefano Keller kaj Marcel Delforge.

Sekvis la elekto de la Estraro por la periodo 2010–2013. Probal Dasgupta estis reelektita kiel prezidanto per 26 voĉoj por, 2 kontraŭ kaj 4 sindetenoj. Claude Nourmont kiel vicprezidanto ricevis respektive 26, 4 kaj 2 voĉojn, kaj Barbara Pietrzak kiel ĝenerala sekretario per 27, 4 kaj 1 voĉoj. Nourmont plu respondecos pri edukado, kulturo kaj kongresoj kaj Pietrzak pri informado. Loes Demmendaal reelektiĝis kiel estrarano pri financo kaj administrado per 28, 2 kaj 2 voĉoj. Tri estraranoj estas novaj: Maritza Gutiérrez pri landa kaj regiona agado (26, 3, 3), Stefano Keller pri eksteraj rilatoj (24, 3, 5) kaj Amri Wandel pri scienca kaj faka agado (23, 5, 4). Kvankam ne en la tuj antaŭa periodo, Gutiérrez estis estrarano jam pli frue dum unu mandato kaj Wandel dum du mandatoj.

Kiel komitatataj reviziantoj estis elektitaj Paulo Branco kaj Marcel Delforge. Ambaŭ ricevis 29 porajn voĉojn; 2 sindetenis. Simile elektiĝis ankaŭ la membroj de la Financa Komisiono. Flory Witdoeck ricevis 30 porajn voĉojn kun 1 sindeteno, Gianfranco Polerani resp. 29 kaj 2, kaj Josep Franquesa Sole 28 kaj 3.

GK UEA

Rezolucio de la 95-a Universala Kongreso de Esperanto

La 95-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Havano (Kubo) kun 1002 partoprenantoj el 59 landoj,

Konsiderante, ke Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2010 Internacia Jaro de Interproksimigo de Kulturoj, konstatas

— ke la diverseco de kulturoj en la mondo grave kontribuas al la riĉeco de la homaro;

— ke jam dum 123 jaroj Esperanto kiel neŭtrala lingvo helpas konstrui pontojn inter popoloj kaj kulturoj, kaj

— ke la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kunigante homojn el plej diversaj landoj tra la mondo, mem atestas tiun kapablon konstrui pontojn,

Deklaras la deziron de la Esperanto-parolantoj kunagi kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por stimuli komprenemon inter popoloj kaj samtempe protekti la identecon de ĉiuj homgrupoj,

kaj invitas Unuiĝintajn Naciojn kaj Uneskon plene eluzi siajn rilatojn kun Universalaj Esperanto-Asocio por efike realigi siajn celojn. *Havano, 24 jul 2010*

konatiĝi kun Kubo pli proksime. Ankaŭ ekster la ĉefurbo la vivo estas malriĉa, sed laŭokule ne mizera. Oftaj transportaj iloj estas ĉevaloj kaj kamionoj, kie homoj staris aŭ sidis sur la ŝarĝplato. Kubo estis eble la plej malriĉa lando, en kiu okazis la kongreso dum pasintaj jardekoj.

Eventuale la nuna Kubo estis eĉ malpli riĉa ol Kubo en 1990. La lando havas nuntempe du-valutan sistemon, ordinaraĵoj pesoj kaj ŝanĝeblaj pesoj, laŭ la kongresa dialekto: kukoj (CUC). Por eksterlandano apenaŭ eblis uzi ordinaraĵojn pesojn, kiuj ebligas al kubanoj vivi en baza nivelo, dum aferoj por turistoj estis vendataj nur per ŝanĝeblaj pesoj, kio ne faris la landon aparte malmultekosta por eksterlandanoj. Prezoj estis eble duono el la kutimaj eŭropaj, aŭ foje en eŭropa nivelo.

Unu el la solvoj por superi transportajn barojn estis kupono donita al ĉiu kuba kongresano por la libroservo. La kuponon eblis uzi nur ekde ĵaŭdo, do

restis tempo por pagipovaj aĉetantoj aĉeti pace, dum en ĵaŭdo la libroservon plenigis kubanoj. Alia kialo por malfrua uzeblo de kuponoj estis, ke UEA kolektis kroman monon por kubanoj ankoraŭ dum la kongreso, kaj tio rezultigis la kreskon de la valoro de la kupono de 30 ĝis 33 ŝanĝeblaj pesoj. Laŭ miaj observoj kubanoj aĉetis plejparte lernolibrojn kaj vortarojn, kiuj tuj elĉerpiĝis, kaj ankaŭ muzikon kaj T-ĉemizojn. Ankaŭ vestaĵoj estas deficitaj en Kubo.

Kubo ja estas la sola lando, kiu ekologie ne superas siajn naturajn rimedojn sed kie la vivo ne estas mizera. Bazaj manĝaĵoj ŝajne sufiĉas kaj akireblas per aĉetlibro malmultekoste, kaj sanservoj estas en modela stato. Kubanoj, almenaŭ parto, tamen sopiras pri konsumeblecoj. Krome neniam rasismo videblis: laboristaj grupoj estis ofte miksitaj, kaj ĉiukoloraj homoj faris ĉiujn laborojn. Ja apenaŭ estis homoj plene nigraj aŭ plene blankaj, sed ĉiuj miksitaj.

Jukka Pietiläinen

Por la finno Jukka Pietiläinen (maldekstre sur la foto) la tropika naturo de ĉi-jara kongreslando ne estas kutima. *(Fotis Emilio Cid)*



Premioj, diplomoj, subvencioj...

En la fermo de la Havana UK estis anoncitaj laŭreatoj de kelkaj tradiciaj premioj de UEA.

La franca esperantisto kaj mond-civitano Philippe Chavignon ricevis la prestiĝan **Premion Onisaburo Deguĉi**, kiu estis starigita de Oomoto por distingi agadon, kiu per Esperanto antaŭenigas la internacian amikecon kaj solidarecon en la spirito de L.L. Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi. Chavignon ricevis la premion pro sia longtempa agado en Afriko kaj Latina Ameriko, kie li plenumis diversajn informajn, instruajn kaj organizajn misiojn por UEA. En la 1990aj jaroj li ekaktivis en indiĝenaj medioj, kunlaborante por la projekto Indiĝenaj Dialogoj kaj poste por la UEA-projekto Indiĝenaj Popoloj.

Diplomon pri Elstara Agado ricevis d-ro Rüdiger Sachs el Germanio, kiu ekde 1997 gvidas Internacian Sciencan Asocion Esperantistan, redaktante ankaŭ ĝian gazeton *Scienca Revuo*.

Diplomon pri Elstara Arta Agado ricevis aktorino Georgina Almanza (Kubo), aktorino Vida Jerman (Kroatio), ĥorestrino Franjo Lévêque (Francio), aktoro Saša Pilipović (Serbio), verkisto Trevor Steele (Aŭstralio) kaj verkistino Spomenka Štimec (Kroatio).

Fondaĵo Antoni Grabowski de UEA ĉi-jare aljuĝis tri premiojn pro elstaraj atingoj en la Esperanta kulturo. Premion de 900 USD ricevis Klivo Lendon, kanadano vivanta en Tokio, kiu esperantigis la epokfaran verkon *La origino de specioj* de Charles Darwin. Alia premio, ankaŭ 900 USD, estis donita al Geoffrey Sutton, kiu kompilis anglalingvan enciklopedion pri la originala literaturo en Esperanto *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*. Speciala premio de 500 USD estas dediĉita al la memoro de Madeleine de Zilah, kiu kunfondis la revuon *La Gazeto* en 1985 kaj kunredaktis ĝin ĝis sia subita forpaso en 2009.

Subvencio Cigno, financata de la japana industriisto Miyoshi Etsuo, estas donata ĉiujare por subteni seriozan Esperanto-agadon en la Tria Mondo aŭ la iamaj socialismaj landoj de Eŭropo. Ĝia valoro estas 500 000 japanaj enoj, t.e. preskaŭ 4400 eŭroj. Ĉi-jare la subvencio estis egale dividita inter Esperanto-Asocio de Bosnio kaj Hercegovino kaj la Komisiono de UEA por Meza Oriento kaj Norda Afriko.

GK UEA

La 6a Azia Kongreso

La 6a Azia Esperanto-Kongreso okazis 19–23 jun en Ulanbatoro. La nombro de la aliĝintoj estis 254 el 33 landoj kaj efektive partoprenis 215 el 27 landoj.

19 jun okazis Interkona Vespere en la etoso internacia kaj amika, kiu aŭguris la sukceson de la kongreso. La kongreso malfermiĝis dimanĉe per saluto de la prezidanto de KAEM (Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado) Lee Jung-kee, kaj sekvis ĝin gratulsaluto de la ĉefministro de Mongolio Sukhbaatar Batbold (anstataŭanto legis ĝin), Hori Jasuo parolis pri la kongresa temo “Azia harmoniigo per Esperanto”. Poste landaj reprezentantoj salutis, kaj finiĝis la inaŭguro per kantado de *La Espero*.

En la dua tago okazis kunsidoj kun jenaj respondeculoj: Kongresa Universitato (Sasaki Teruhiro), Mongola Historio (Dagva Gereltogtokh), Ĝemelaj Urboj (Nakacu Masanori), Junulo (Okuŭaki Toŝiomi), Mongola Eksprese (Myagmar Altantsetseg), KAEM nepublika, Rememore al Lee Chong-yeong (Park Yong-song), Konversacio (Renée Triolle), Kaligrafio en la tuta Azio (Hori Jasuo). Vespere okazis Nacia Vespere en la armea teatro.

Sekvatage okazis pliaj fakkunsidoj kaj vespere aŭkcio, kies profito iris al UEA-konto “Espero” por savi esperantistajn viktimojn en katastrofoj, kaj Oratora Konkurso, en kiu al Franciska Toubale el Aŭstralio estis aljuĝita la unua premio. Sekvis kantoj, dancoj kaj akrobataĵoj de geknaboj, kiuj devenas de malriĉa kvartalo kaj estas vartitaj kaj gvidataj de bonkorulo.

La laborprogramo daŭris dum la tuta sekva tago ĝis la Internacia Vespere. Komence de ĝi pli ol 20 partoprenantoj parade montris sin en sia nacia kostumo, kaj poste ili montris siajn talentojn: muzikludojn per saksofono, trumpeto, violono, pajnoŝalmo, akordiono kaj etnaj, nekutimaj mondaj muzikiloj, fasonparado de kimono-virinoj, maniero vesti sin per kimono, Noa danco (japana tradicia teatraĵo), Tajĝiĉuano ktp.

23 jun okazis la fermo. Estis prezentitaj la novaj estraranoj de KAEM: prezidanto Sasaki Teruhiro (Japanio), vicprezidanto Wang Ruixiang (Ĉinio), membro Hoang Ngoc Boi (Vjetnamio), sekretario Park Yong-sung (Koreio)

La 7a Azia Kongreso okazos en Israelo en 2013 por eviti la kolizion kun la UK en Hanojo en 2012. Poste AK okazos en ĉiu dua jaro.

Hori Jasuo



Esperantistoj en Ulanbatoro (Fotis Arai Tosinobu)

IKUE jubileis en Parizo

Okaze de sia cent-jara jubileo IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) decidis kongresi 27 jun – 3 jul 2010 en Parizo, la urbo de sia fondiĝo. Bedaŭrinde oni trovis tie kongresejon nur por 80 homoj, tiel ke jam preskaŭ duonan jaron antaŭ la kongreso ĉiuj lokoj elĉerpiĝis. Tiuj, kiuj sukcesis, povis esti feliĉaj: ni povis loĝi en benediktana monaĥinejo apud la mondfama Baziliko de la Sankta Koro (Sacré-Cœur de Montmartre), sur monteto de kie prezentiĝas vasta panoramo de Parizo.

Dum en 1910 en Parizo preskaŭ 600 homoj ĉeestis la inaŭguron de la unua IKUE-kongreso, cent jarojn poste ni estis preskaŭ dekoble malpli.

La 63a kongreso de IKUE okazis en malfacila tempo por la Katolika Eklezio. “Eventuala diskuto pri ekzistantaj skandaloj en la Eklezio neniom valoras por IKUE, do ne valoras pridiskuti ilin”, — opiniis iuj, dum aliaj trovas grave lerni el ili. La temo do tamen menciigis ĉe Ronda Tablo pri la demando “Kion signifas esti katolika esperantisto?”, kie mi klopodis veki komprenon por pli progresemaj ideoj. Tiaj ideoj ja povas fondi el tre estiminda sopiro — la sopiro de homoj pri eklezio, kiun ili povas tutkore ami. IKUE klopodas konstrui pontojn inter katolikoj el diversaj landoj, kaj per eklezia dialogo ankaŭ inter kristanoj de diversaj konfesioj. Estus bone, se IKUE klopodus konstrui pontojn ankaŭ inter katolikoj kaj la sekulara mondo.

Same kiel antaŭ cent jaroj, ankaŭ ĉi-foje ni preĝis por la unueco de la kristanoj, kaj diskutis pri tio, kia estu tiu unueco. En la unua kongreso, oni konkludis (kvankam eble ne unuanime), ke tia unueco povas ekzisti nur sub gvido de la

Papo. Ĉi-foje menciigis ankaŭ pli modernaj ideoj — ekzemple la penso pri “unueco en diverseco”, aŭ la espero de la teologo Hans Küng pri “nuligo de homfaritaj dogmoj, kiuj disigas la kristanojn”. Ĉar IKUE kunigas katolikojn kun malsamaj opinioj kaj malsamaj kulturaj fonoj, ne ĉiam facilas trovi interkonsenton. Ĉiukaze, en siaj retejo kaj revuo, IKUE plu traktos temojn unuavice el vidpunkto de Vatikano, ekzemple per traduko aŭ resumo de Papaj dokumentoj. Kiu deziras legi alispecajn opiniojn en Esperanto, povas abonati al *Monato* aŭ *Dia Regno*, por kiuj verkas i.a. la eksaj IKUE-aktivuloj Stefan Maul kaj Jacques Tuinder.

La kongreso enhavis belajn spiritajn travivaĵojn, ekzemple esperantlingvan meson kun ducent (parte neesperantistaj) partoprenantoj en la Kapelo de la Mirakla Medalo. En agrabla rememoro restas ankaŭ la “angela” kantado de la benediktaninoj dum iliaj preĝoj.

La atmosfero en la kongreso estis tre frata kaj amika. Dum en mia lando katolikaj episkopoj insultis unu la alian kaj la katolika laikaro displitiĝis inter la pli progresema Centra Komitato de la Germanaj Katolikoj kaj la pli konservativa, papisma Forumo de Germanaj Katolikoj, la IKUE-anoj respektoplene kaj amike rilatas unu al la alia. Okaze de la kongreso, la Papa Konsilio por Laikoj laŭdis IKUE pro “konstanta kaj totala fideleco al la Instruado de la Eklezio”. Iuj kantis la Papan Himnon (“Benedikton la 16an, benu Dio, gardu lin”) el tuta koro, dum aliaj emfazus, ke himnojn meritas unuavice Dio kaj Jesuo. Sed ĉiuj sentis sin anoj de unu komunumo.

Ulrich Matthias

PS. La aŭtoro uzas la vorton *katolika* en la senco *romkatolika* (La red.).



35 infanoj naĝis sub suno kaj pluvo **IMEK-17: Homo kaj naturo**

La 41a Internacia Infana-junula Kongreseto (IIK) sukcese okazis 17–24 jul 2010. La hotelo *Acuario*, situanta 5 km oriente de la UK-ejo, servis kiel feria centro por 44 IIK-anoj. Krom 9 plenkreskuloj ĉeestis 18 knaboj kaj 17 knabinoj aĝaj de 3 ĝis 16 jaroj. Donacoj de kongresanoj ebligis partoprenon de 17 kubanoj. Dankon al ĉiuj bonkoraj esperantistoj kiuj ĝis nun subtenis IIK-on aŭ iam faros tion. Kune kun granda grupo de 10 meksikanoj kaj 2 katalunoj, la hispana lingvo ĉi-jare regis inter la krokodiloj.

La veteron regis suno kaj akvo. La suno ŝvitigis niajn korpojn dum ludoj kaj brunigis aŭ ruĝigis nian haŭton. Akvo falis el la vespera ĉielo por purigi la aeron, sed foje fluis ĝis la koridoroj. Tiun pluvakvon suĉis la fruktarboj por porti bongustajn fruktojn, kiujn ni ĝue manĝis aŭ sukforme trinkis en la bufeda restoracio. Sed plej gravis la pura akvo en la basenoj. Banado ja povus daŭri horojn, sed logis aliaj programeroj.

Lingvaj ludoj, Esperanto-kursoj en tri grupoj, origamio kaj sorobano (japanaj paperfaldado kaj abako-kalkulado). Ekskurso al plaĝo, al Havano kaj al akvario kun delfena spektaklo. Sportado kaj eksteraj kur-ludoj en grupoj. Dancado en la hotela diskoteko. Internacia vespero kaj aparta spektaklo de la meksika grupo sur podio. Infanoj prezentis siajn urbojn per fotoj projekciataj sur mura ekrano. La gvidantoj preparis pli ol ili povis fine realigi. Kaj ĉiuj IIK-anoj aperis en la Solena Fermo de UK.

IIK 2011 okazos en la dana urbo Hundested apud maro. Informoj pri IIK estas en la retejo bertosch.free.fr.

Bert Schumann

En sudhungarlandaj universitataj urboj 3–8 jul 2010 estis aranĝita la 17a Internacia Medicina Esperanto-Kongreso, en kiu renkontiĝis esperantistoj, kiuj internacie kunlaboras per Esperanto en medicina tereno por ke la homaro trovu taŭgajn kuracmetodojn.

La nombro de kongresanoj ne estis granda: registriĝis nur 69 partoprenantoj el ses landoj, sed dum la kongresaj programeroj partoprenis kun la gastoj pli ol 90 personoj.

La ĉefa temo de la kongreso estis “Rilato inter la homo kaj la naturo”, kaj en plimulto el la 32 prelegoj temis pri tiu kongresa ĉefa temo.

La laborprogramo estis en ejoj de la Scienca universitato en la urboj Hódmezővásárhely kaj Szeged. Krome okazis kulturaj programeroj, ekspozicioj de Márai Kálmár Szenté kaj Mária Gara, teatraĵo de Georgo Handzlik, vizitado de la ikonpentristo Sándor Józsei, de la ceramik-manlaborejo de la familio Garai, de la historia muzeo en la urbeto Ópusztaszer, kongresa bonhumora balo, kaj vespermanĝo en la restoracio Halászcsárda (fama fiŝsupo estas tie).

Krom la kongresa temo okazis ankaŭ prezentado de naturkuracadoj, Yumeiho-masaĝo, joko, ĉi-kung. Estis skriba kaj praktika ekzameno por Yumeiho-terapeŭtoj antaŭ internacia ekzamenkomitato por la dua kaj tria gradoj. Okaze de la kongreso aperis en Hungario nova kajero pri la tria grado de Yumeiho-masaĝo de Saionji Masayuki, Włodzimierz Opoka kaj Katarina Faragó.

La sekva IMEK okazos en la ĉeĥa urbo Opava post du jaroj.

Katarina Faragó

Renkontiĝo de Esperantaj Familioj

Inter 25 jul kaj 8 aŭg en montara parto de Kroatio, en kastelo Stara Sušica, okazis la 32a Renkontiĝo de Esperantaj Familioj (REF). Partoprenis 59 personoj el 14 familioj el 11 landoj, iomete malpli ol antaŭe, parte pro pli altaj kotizoj ol kutime, parte pro krizaj jaroj kiam ne ĉiuj dezirantoj sukcesas trovi necesan monon. Spite al tio, REF restis bonega aranĝo por la tuta familio, riĉa je diversaj aktivadoj orientitaj kaj al infanoj kaj al gepatroj.

REF estas nekutima en la Esperantomondo: malantaŭ ĝi staras neniu organizo, ĝin neniu finance subtenas, kaj tio signifas ke ĝi estas tute sendependa kaj ĝian vivon direktas nur la familioj kiuj ĝin regule partoprenas. Tiel REF vivas jam 32 jarojn: ekde la komenco ĝi estas aranĝo por familioj, en kiuj Esperanto estas regule parolata de ĉiuj membroj. La celo de REF neniam estis varbi por Esperanto inter neesperantistaj familioj aŭ instrui Esperanton al familioj, en kiuj ne ĉiuj konas la lingvon, sed montri al infanoj ke ekster ilia familio vere ekzistas “Esperantujo”, ebligi komunajn ludojn kaj amuziĝojn de infanoj en Esperanto, kaj tiumaniere montri ke Esperanto estas utila lingvo kiun oni povas uzi por ĉio — eĉ ludoj.

Dum jaroj tiu celo ne ŝanĝiĝis, malgraŭ la generaciaj ŝanĝoj, nur la manieroj atingi ĝin ŝanĝiĝis dum la tempo. En la fruaj REF-aj jaroj, oni preparis plurajn prelegojn, lecionojn kaj lingvajn ludojn por plibonigi la lingvon de infanoj, kaj nun oni ĉefe subtenas komunajn aktivadojn inter infanoj kaj infanoj kaj gepatroj por vivi la uzon de la lingvo.

Ĉi-jara REF organizita en bela kastelo (nun uzata kiel junularriposejo) ofertis dum du semajnoj multe da spaco kaj aktivadoj en ĝiaj ejoj dediĉitaj nur por REFanoj. La belan naturon ĉirkaŭ la kastelo oni uzis por ekskursoj al najbaraj pintoj kaj kanjonoj kaj, fine, ankaŭ por du tuttagaj ekskursoj al Adriatika marbordo kiu troviĝas nur unu horon for — speciala ĝuo por tiuj kiuj venis el senmaraj landoj aŭ de nordo. Ĉiujn laborgrupojn preparis la partoprenantoj mem, kaj plurajn preparis la infanoj mem por siaj amikoj kaj tiel montris sian kreemon kaj memstarecon.

Dum REF estis ankaŭ decidite ke venontjara REF okazos en la sveda urbeto Lesjåfors, kaj ĝi iĝos la plej norda REF en sia historio.

Vanja Radovanović

Somera Esperanto-Studado 2010

2–10 jul okazis en Piešťany (Slovakio) la populara Somera Esperanto-Studado 2010. Jam la kvaran fojon partoprenas ĝin esperantistoj de ĉiuj lingvokonaj niveloj — ekde veraj komencantoj ĝis spertuloj. Jam la trian jaron SES estis kunigita kun renkontiĝo de *lernu!*-uzantoj. La aranĝo okazis en Hotela Akademio de Ludovít Winter. Organizis ĝin E@I kaj Slovaka Esperanta Junularo.

La unua — tute neantaŭvidita — sukceso estis en la nombro da partoprenantoj. Aliĝis sume 219 personoj, venis 190. Por komparo: la pasintjaran SES partoprenis 90 homoj. Grandan rolon ludis ankaŭ la malproksimeco de ĉi-jaraj IJK kaj UK, pro kio multaj eŭropaj esperantistoj serĉis iun “pli proksiman” aranĝon. Plej multe da partoprenantoj venis el Pollando, Slovakio, Germanio, Hispanio kaj Francio, tamen ne mankis esperantistoj el Kanado, Usono aŭ Ĉinio. La plej malproksiman vojon trairis vojaĝante al SES esperantisto el Paragvajo.

La grandega interesiĝo estis por la organizantoj ja tre agrabla surprizo, tamen “danke” al tio aperis poste kelkaj malfacilaĵoj, ĉefe dum ekskursoj, kiam iĝis sufiĉe malfacile teni la grupon kaj konvinki la homojn, por ke ili restu kune kun sia grupo kaj ne disiĝu.

La partoprenantoj estis dividitaj en kvar grupojn laŭ siaj lingvokonaj. La komencantojn instruis Stano Marček (Slovakio), komencintojn Dalia Pileckienė (Litovio), plian grupon instruis Petra Smideliusz (Hungario). La grupon de spertuloj gvidis Marta Kovács (Hungario). Paralele okazis la metodika seminario *Flugiloj de Interkultura Vento*, kiun gvidis Radojica Petrović. Novaĵo estis instruado por nevidantaj personoj — kunlabore kun LIBE (Ligo Internacia

de Blindaj Esperantistoj). Multaj eluzis la eblecon plenumi KER-ekzamenon kaj diligente prepariĝis por ĝi dum la semajno sub gvidado de Zsófia Kóródy. Ŝi ankaŭ diligente zorgis pri la parto de la programo por la projekto “Esperanto 55+”, kiun finansas EU-programo Grundtvig. Pere de ĝi povis veni al SES 25-homa pollanda grupo, kiu spertiĝadis pri la instruado de Esperanto por povi ĝin sekve instrui en la universitatoj de la tria aĝo. Pri novuloj zorgis multaj “anĝeloj”, spertaj esperantistoj, kiuj volonte helpis kaj konsilis al aliaj.

El la programo ni menciuj almenaŭ koncertojn, ekskursojn, specialajn “hotelakademiajn” kursojn — koktelistan kurson kaj “carving” (ornaman legomtranĉadon), aŭ kurson de la japana batal-arto aikido, kiun partoprenis ankaŭ blinduloj. La membroj de LIBE aktive partoprenis ankaŭ la kursojn de la slovaklingva, dum kiuj eĉ montriĝis, ke la plej lerta kaj diligenta kursano estas Riikka Kannisto el Finnlando.

Por la lasta vespero la organizantoj preparis “neforgeseblan” programon, paŝadon sur braĝo. Ĝi iĝis neforgesebla ĉefe por la organizantoj mem, ĉar malgraŭ antaŭaj preparoj kaj elprovado “sur la propra haŭto” kelkaj kuraĝuloj ricevis brulvezikojn sur siaj piedoj. Ni pardonpetas pro tio kaj esperas, ke la piedoj de ĉiuj malfeliĉuloj estas jam en ordo. Plej verŝajne kaŭzis tion la varmegaj ŝtonetoj (ne la braĝo), kiuj bedaŭrinde enmiksiĝis inter la braĝerojn.

Nun, unu monaton post SES ni povas konkludi, ke la aranĝo bone sukcesis. Ni esperas, ke la semajno estis utila kaj kontribua por la partoprenintoj, sed ĉefe — ke oni simple ĝuis la tempon pasigitan en SES.

Katarína Nosková
kunorganizanto

IEK en la Esperanto-urbo

Ĉi-jara Internacia Esperanto-konferenco (Herzberg, 17–23 jul 2010) pritraktis la temon “Kial Esperanto estas revolucia lingvo?” La kunveno okazis en speciale “verda atmosfero”, kaj pro tio apartajn dankojn meritis la prezidanto de OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj) Anne Jausions kaj la kasisto Eric Laubacher.

Okazis prelegoj de renomaj esperantistoj, kiel prof. Michel Duc Goninaz (Francio), d-ro Detlev Blanke, d-ro Ulrich Lins, Josef Dörr, Ĵak Le Puil, Toon Witkam. Lena Karpunina prezentis siajn verkojn kaj raportis pri travivaĵoj el sia hejmlando Taĝikio.

Supozeble la plej elstara kulturevento de la semajno estis la koncerto de Ĵak Le Puil. Kantoj pri amo, revolucio kaj famaj francaj kanzonoj apartenas al lia granda repertuaro. La urbestro Gerhard Walter akceptis la kvindekda partoprenantoj el 12 landoj en la kavalira salono de la Welf-kastelo en Herzberg. La simpatia urbestro eĉ respondis la demandojn de la konferencanoj en Esperanto.

Bela perlo aldoniĝis al la tutsemajna programo: Armelle Le Quint prezentis en la urba biblioteko ekspozicion kun pli ol 40 variaj pentraĵoj. Dum la inaŭguro de la ekspozicio la vere multflanka artistino povis respondi demandojn de la scivolemaj ĉeestantoj.

Ekskursoj al la historia urbo Goslar kun la miljara imperiestra palaco Kaiserpfalz, al la urbo Braunschweig, vizito de la Interkultura Centro Herzberg, vizito de la nova Zamenhof-monumento kaj rondrigardado tra Herzberg am Harz — la Esperanto-urbo kun jam konsiderinde multaj vidindaĵoj en Esperanto apartenis al la kulturriĉa semajno.

Peter Zilvar



SES: la komuna foto (Fotis Andrzej Sochacki)

Finlando: Anstataŭ kursosemajno

Anstataŭ la semajna kurso en la Popola Instituto de Valamo, nuligita pro manko de partoprenantoj, Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) aranĝis en Finnlando turneon de la instruisto Atilio Orellana Rojas. Al ĝi apartenis dutaga elementa kurso en feria kursejo proksime de la urbo Lahti. Pri la turneo estis sendita gazetara komuniko al finnlandaj amaskomunikiloj.

La turneo enhavis krom la kurso vizitojn en la urboj Turku, Tampere kaj Helsinki kaj en ĉiuj lokoj renkontiĝojn kun lokaj esperantistoj.

La elementan kurson de Atilio en Lahti partoprenis kvar gelernantoj. Aliaj partoprenantoj, entute dudeko, uzis la lingvon en praktiko diskutante kaj ludante. Alia eksterlanda gasto, Telma Oliveira Ribeiro, venis el Brazilo. Ĉiuj partoprenantoj bone interkonatiĝis i. a. en la saŭno kaj dum kolbasfritado, kiuj estas devigaj elementoj en finnaj some-raj renkontiĝoj en la kamparo. Ankaŭ la vetero estis belega kaj varma.

La gazetara komuniko de EAF rezultigis du bonajn intervjuojn. Kalle Knii-vilä kaj Salla Lappalainen estis dum kvaronhoro intervjuitaj de la finna ŝtata televido en rekta elsendo. Ili rakontis kiel ili uzas Esperanton kaj hejme kaj inter geamikoj ĉie en la mondo. La intervjuo havis la titolon *Esperanto kiel hobbio kaj hejma lingvo*.

Atilio Orellana Rojas estis intervjuita de Finnlanda novajagentejo (STT, Suomen tietotoimisto). La redaktoro kaj fotisto vizitis la oficejon de EAF en Helsinki. Atilio estis demandita dum preskaŭ du horoj pri lia vivo, pri liaj spertoj de Finnlando kaj kompreneble pri la fenomeno Esperanto. La artikolo aperis en la kategorio *persono de la semajno* kaj estis tra la reto en uzo de preskaŭ ĉiuj finnlandaj amaskomunikiloj. Multaj kaptis la tekston kaj tiel la artikolo kun bildo aperis en pluraj gazetoj.

Esperanto-Asocio de Finnlando estis tre kontenta en ĉi-jara somera evento, speciale ĉar pro nuligo de kursosemajno ĝi estis iom improvize aranĝita. Venontsomere la kunlaboro kun la Popola Instituto de Valamo daŭros. La kursosemajno estos meze de junio, kaj antaŭ ĝi okazos ekskurseto al la mondo de muminoj. Komence de julio estas planita tute nova aranĝo en komunumo Sonkajärvi, kie ankaŭ esperantistoj povos tiam porti la virinon. Informiĝu ĉe la retpaĝo www.esperanto.fi.

Tiina Oittinen



Paul Gubbins parolas pri la longa Esperanto-kariero de Marjorie Boulton. (Fotis Hilary Chapman)

Barlastono jubileas

Por lerni la rusan, la germanan, la francan, la hispanan, kio estas pli bona ol vivi en la landoj de la respektivaj lingvoj mem? Ke tuta submergiĝo en la medio de fremda lingvo plej efikas eĉ por tiuj, kiuj ne havas naturan lingvolernan talenton, estas bone konate. Abundas instrumentodikoj kaj pedagogiaj teorioj, inter kiuj troviĝas kaj libere haveblaj kaj pripagendaj. Ĉiuj kursoj, eĉ la respektindaj, provas iel kompensi la lernonton kontraŭ tio, ke ne eblas, lernocelo, simpla transloĝiĝo en landon de la sopirata lingvo dum, ekzemple, unu jaro.

Kiel esperantistoj, ni feliĉas pro la relativa facileco de nia lingvo. La regul-eco de la gramatiko kaj la leksika ekspluato de vortkonstruaj eblecoj plej efikigas la tradiciajn metodojn de lernado. Rego ja eblas, eĉ por izolita meminstrua lernanto. Kia miraklo, ĉu ne? Sed eĉ Esperanto bezonas ekzercon de la aŭskultado kaj precipe de la elparolado, por ke esperantisto fariĝu kompetenta kaj fluparola.

Tial estas bonvenega la ĉiujara Somera Festivalo en Wedgwood Memorial College, Barlaston (Anglio). Dum kvin tagoj (9–13 aŭg) oni uzas la anglan nur por danki kelnerinon aŭ mendi pajnton en la trinkejo post la tagaj sesioj. Oni parolas aliffoje nur Esperanton.

Eble surprizus eksterlandajn Esperantistojn ke la britaj Esperantistoj parolas al si nur Zamenhofe. Kiam tiuj sidas ekster la ĉeesto de ne-Brito oni aŭdas el iliaj buŝoj nur Esperanton. Kiam tiuj renkontas unu la alian en la koridoroj la “Saluton”, la “Ĝis poste”, la “Pardonon; mi preterpasu” aŭdiĝas ĝuste tiel, ne en la angla. Kiam ili piediras kune de la

manĝejo al la venonta sesio ilia konversacio estas nur en nia lingvo. Alivorte, la submergiĝo en Esperantio estas tuta, absoluta, kaj perfekta.

Aldonu al tio la ĝuindajn lernosesiojn en malstreĉa etoso far Hilary Chapman kaj Jack Warren, la eblecon viziti la bibliotekon Butler, la bongustajn kaj grandkvantajn manĝojn, la belajn tradiciajn domojn de la kolegio Wedgwood en plaĉa angla kamparo, la jam menciitan vilaĝan trinkejon, varioplenan distran vesperon, kaj oni konstatas recepton de plezurplena ferio en Esperantolando.

Krome plezuris ĉi-jare pro la celebromerkrede de la okazo de ĉi tiu la 50a Somera Festivalo. D-ro Paŭlo Gubbins, antaŭ ŝerea tosto, skizis la historion de la Festivaloj kaj solene dankis tiujn kiuj organizis la antaŭajn 49 kaj la nunan. Post la festa lunĉo d-ino Marjorie Boulton amuze kaj informe rakontis siajn memorojn de la Someraj Festivaloj dum kiuj ŝi, iom pli ol en la hodiaŭaj, ŝvite laborigis la partoprenantojn. Aldona plezuro estis la ĉeesto de d-ino Katherine Hall, plej lerta instruistino kaj helpantino de la fruaj Someraj Festivaloj.

La unua paŝo en la venontajn ducentjarojn da Someraj Festivaloj estas jam aranĝita kaj mendebla. Eĉ se en 2011 ne prelegos Marjorie, nek Paŭlo, nek ĉeestos Katherine Hall, vaĝeto en tia oazo de Esperanteco en tre ĉarma loko estas nepre rekomendinda.

Hju Rid

Esperantistoj meditadas

8–11 aŭg 2010 okazis la 5a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado en la Seula seminariejo Bongdo, aranĝita de Esperantista Asocio de Ŭonbulismo kun partopreno de 35 esperantistoj el kvar landoj.

La programo de la renkontiĝo konsistis el “Iamajna kaj ieajna meditado”, “Ŭonbulismo kaj Esperanto”, “Matenmeditado”, “Korea tradicia muziko”, “Floro de Koreio”, kaj “Ekskurso en Seulo”.

La 6a renkontiĝo okazos 9–12 jan 2011 en la sama seminariejo, kiu situas en trankvila loko en Seulo. Interesatoj pri la renkontiĝo turnu sin al Lee Jung-kee (esperanto@saluton.co.kr), kiu estas fenestro de la prepar-komisiono.

Lee Jung-kee

SAT: Mirinde bona kongreso

La 84a Kongreso de SAT okazis komence de aŭgusto en la pitoreska urbo Braŝovo, ĉe Karpatoj en Rumanio, kun 82 partoprenantoj el 17 landoj.

La kongresejo estis en la lernejo *Andrei Saguno* kie la kongreso estis malfermita en ĉeesto de reprezentantoj el politiko, sindikatoj kaj la landa Esperanto-Asocio en Rumanio.

Laŭ la kutimo de SAT-kongresoj, okazis ankaŭ ĉi-jare la jarkunsido de SAT dum sinsekvaj laborkunsidoj. La laborkunsidoj traktis la raporton de la Plenum-Komitato, la revuojn de SAT. Okazis prelegoj kun debatoj pri multaj temoj. Estis akceptite, ke SAT uzos estonte la servojn de etikaj bankoj, ktp.

Aparte menciinda estas la zorgo, kiun la lokaj organizantoj donis al turismaj kaj kulturaj aranĝoj. Okazis, inter alie, vizito al Raŝnov, Sibiu, la urbo de Andreo Cseh, kaj ekskursoj al Buku-reŝto kaj Sigiŝoara.

La teatraĵo de Eugen Ionescu *La kalva kantistino*, prezentado de la Koruso de gimnazio 25, kaj la koncerto de *Kanzoneta* (lernantoj el la liceo Johannes Honterus) ricevis grandan aplaŭdon kiun ili meritis.

Entute: mirinde bona kongreso, kie ne nur SAT-membroj trovis la amikecon kiu kutimas en SAT. SAT, kiu nun post tempo malbona revenis kun entuziasmo necesa por fari sian laŭstatutan taskon.

Post unu jaro SAT kongresos en Sarajevo (Bosnio-Hercegovino).

Jakvo Schram

Du malsamaj vojoj

En la German-Franca Esperanto-Kongreso en Kaiserslautern (21–24 maj 2010) la germana sekcio de Eŭropo — Demokratio — Esperanto (EDE) elektis novan estraron. La ok ĉeestantaj membroj — ĝuste tiuj ok aktivuloj, kiuj fondis la sekcion en 2008 — elektis Konrad Gramelspacher kiel la novan prezidanton.

Samloke okazis prezento de la “konkurenca” esperantista partio UNU MONDO. Dum EDE deziras plifortigi la demokration en Eŭropo, por UNU MONDO plej gravas kontribui al pli paca, pli justa kaj pli humana mondo. Montriĝis, ke verŝajne ne eblas unuigi la du movadojn. Post la kongreso, UNU MONDO dediĉis sian energion i.a. al pli alloga retejo en Esperanto kaj la germana: <http://www.unu-mondo.org>

Ulrich Matthias



SATanoj kunvenis en Braŝovo.

ILEI konferencis en Kubo

La Hotelo *Kanimao* (Canimao) ĉe la rivero Kanimaro (Canimar), dekon da kilometroj oriente de Matanso (Matanzas), ĉe la plej norda parto de la marbordo de Kubo, provizis intimitosan kunvenejon al esperantistaj instruistoj, instruemuloj kaj studentoj por la 44a konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), dudek jarojn post la unua ekstereŭropa ILEI-konferenco okazinta same en Kubo. Sesdeko da partoprenantoj venis el 26 landoj de ĉiuj kontinentoj krom Afriko. Tamen kelkaj afrikaj studentoj de la Universitato de Matanso vizitis la konferencan lingvan festivalon.

La konferenca temo *Edukado por kultura proksimiĝo* estis komuna fadeno de la tradiciaj konferencaj programeroj: prelegoj, laborgrupaj kaj komitataj kunsidoj, vespera distra programo (interkona, kuba, latinamerika, internacia kaj adiaŭa vesperoj), lingva festivalo kaj ekskursoj.

Tute praktikan kontribuon al la konferenca temo donis la trejnseminario *Flugiloj de interkultura vento* por instruistoj, instruantoj kaj instruemuloj de Esperanto. Partoprenis 22 seminarianoj el sep latinamerikaj kaj tri aliaj landoj, el kiuj 17 havis stipendion de ILEI, Amerika Komisiono de UEA aŭ TEJO. Ĝi estas unu el serio de kvin samcelaj seminarioj en Eŭropo, Ameriko, Azio kaj Afriko kiujn ĉi-jare ILEI organizas aŭ finance subtenas per tiucele ricevita subvencio de UEA kaj el propra kaso de la projekto *Interkulturo*.

Jen kelkaj pritaksoj de la seminarianoj:

— Tio, kion mi certe lernis kaj uzos kiel instruisto, estas la grupaj aktivaĵoj, en kiuj oni devas akordiĝi, diskuti, kunpensi. La kunigo de diversaj konoj, ne nur de la gvidantoj, sed de ĉiu partoprenanto, riĉigis la enhavon de planitaj (kaj neplanitaj) aktivaĵoj.

— La interkulturaj ludoj kaj taskoj evoluigis nian interkulturan komprenon.

— Mi kredas, ke estas tre bone uzi didaktikajn situaciojn kie la lernantoj partoprenas aktive, ne nur aŭskultante. Interŝanĝo de ideoj kaj partopreno de aliaj seminarianoj estis gravaj por ke la ludoj kaj situacioj, kiuj estis kreitaj dum la seminario, estu produktivaj.

La tradicia Lingva Festivalo de ILEI en la centro de Matanso altiris atenton de pasantaj urbanoj, kiuj miksiĝis kun la konferencanoj por ĉeesti prezentojn pri dudeko da lingvoj (ekzemple: la kreola de Haitio, indiĝenaj lingvoj en Meksiko, variaĵoj de la hispana lingvo en Ameriko, hebrea, serba, japana...). Unu el la partoprenintoj komentis:

“Estas mirinde, ke tiel simple oni povas okazigi eventon, en kiu oni prezentas buntan mozaikon de lingva kaj kultura diverseco. Lokanoj povis sperti tiun diversecon sciante, ke Esperanto estas ĝia perilo. Tio estas ege grava, ĉar hodiaŭ ankoraŭ ekzistas homoj, kies priesperanta bildo estas tiu de iaspeca hegemonia unulingvismo. Mi demandas, kial oni ne organizas similan eventon dum UK?”

Dankinte la organizantojn kaj gastigantojn pro la agrabla kaj plursence riĉiga semajno, la konferencanoj kunveturis al la UK en Havano. La sekva konferenco okazos en Kopenhago 2011.

Radojica Petrović



Honora Patrono Brandenburg

Ulrich Brandenburg, la germana ambasadoro en Moskvo, estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. La unuaniman decidon faris la Komitato de UEA en sia kunsido en Havano.

Ulrich Brandenburg naskiĝis 12 okt 1950. Post studado de lingvoj en Münster kaj Parizo Brandenburg unue laboris kiel instruisto. En 1980 li komencis sian karieron en la diplomatia servo de Germanio. Li deĵoris unue en la ambasado en Bagdado 1982–1984 kaj daŭrigis en la tiama Sovetunio ĉe la ĝenerala konsulejo en Leningrado (nun Sankt-Peterburgo) de 1984–1986 kaj ĉe la ambasado en Moskvo 1986–1988.

Ĝis 1995 li deĵoris en la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, krom 1991–1992, kiam li studis en la Harvarda Universitato. De 1995 ĝis 1999 li gvidis sekcion ĉe la administracio de NATO en Bruselo. Reveninte al la Ministerio en 1999 li laboris i.a. kiel komisiito pri Ruslando, Kaŭkazio kaj Centra Azio kaj kiel vicestro de la Politika Departemento, ĝis sia unua nomumo kiel ambasadoro. En aŭgusto 2007 li fariĝis konstanta reprezentanto de Germanio ĉe NATO en Bruselo. Poste, pro sia sperto pri la slava mondo kaj pri Ruslando, li estis nomumita kiel ambasadoro en Moskvo, kie li deĵoras ekde aprilo 2010.

Brandenburg estas denaska esperantisto. Dum pluraj jaroj Brandenburg aktivis en Germana Esperanto-Junularo, kies prezidanto li estis 1974–1976. Li redaktis ankaŭ la GEJ-rubrikon “Pozitive” en *Germana Esperanto-Revuo*. En 1974 li havis la ĉefan respondecon pri la organizado de la TEJO-kongreso en sia hejmurbo Münster. Vicprezidanto de TEJO li estis 1973–1975.

GK UEA

ARKONES-26

**24-26 sep 2010
en Poznań (Pollando)**

FREŜO refreŝigita

FREŜO, deĉifrebla kiel Frusomera Renkonto de Esperantistoj Ŝatantaj Olŝtinon, akiris novan subtitolon: “Forumo de Esperanta Kulturo”. Jen formal-aĵo, kiu atentigas pri alia aspekto de la aranĝo, okazanta ekde 15 jaroj (kun paŭzoj) en la ĉefurbo de la nordorienta pollanda regiono Varmio kaj Mazurio, kiun karakterizas belaj historiaj postrestaĵoj ene de mirinda naturo.

La nova subtitolo konfirmas, ke FREŜO jam delonge eliris el la esperantista katakombo. Ĝi estas oficiale rekonita kiel programero de la Olŝtina Arta Somero, kiu ĉiujare dum la feriaj monatoj pulsas en Olŝtino kaj speciale en ĝia ĉarma mezepoka kvartalo. Ĝuste tiuloke Jean Marc Leclercq, konata kiel JoMo, okul- kaj orel-frape markis la ekziston de la Esperanta kulturo. Zamenhof mem verŝajne inspiris tiun ĉi talentan francon allogi la neesperantistan publikon amase spekti kaj danci lian Esperantan kantadon.

Tradicie la aranĝo estis turisma kaj distra, sed ĉi-foje aperis ankaŭ programeroj rilatantaj al gravaj historiaj eventoj aktuale festataj en Pollando. FREŜO reagis al la Internacia Jaro de Ŝopeno jam dum la inaŭguro, kies rutinajn paroladojn dividis verkoj de la genia komponisto plenumataj de la junaj lokaj virtuozaĵoj Julia Rumińska kaj Michał Tyczyński. Alian tagon estis prezentita la filmo *Ŝopeno revenas al Majoroko* kaj okazis prelego pri la jubileulo, naskiĝinta antaŭ 200 jaroj. Ne povis manki ankaŭ temoj rilatantaj al 600-jara datreveno de granda mezepoka batalo ĉe Grünwald kaj 100-jara datreveno de la premiera prezento de *Ĵurkanto* de Feliks Nowowiejski laŭ la vortoj de la pola poetino Maria Konopnicka.

Andreo Gielert, loka esperantisto, invitis ĉiujn al la granda mezepoka batalo sur Grünwald-kampoj. En la riĉe ilustrita prelego li prezentis skizitan historion de Teŭtona Ordeno, rilatojn inter poloj kaj teŭtonoj en la 14a kaj la 15a jarcentoj kaj fine la batalon mem.

Kiel nun aspektas la batalkampo partoprenantoj de FREŜO povis vidi dum la sabata busa ekskurso. Dum ĝi oni vizitis ankaŭ la etnografian muzeon en Olsztynek kaj la historian “Episkopan Vojon” en la loko Bałdy, kie okazadis la 3a Varmia Kermeso.

Alia karakteriza eco de la Olŝtina aranĝo estas videbla ĉeesto de la lokaj eminentuloj. Foje ŝajnis, ke ili propr-

okule deziris konfirmi la ĝustecon de sia malavara subvencio de la aranĝo. Jen la sekreto, kial FREŜO estas mirinde multtekosta. Tio estas facile klarigebla: la organizantoj ĝuas bonajn rilatojn kun la lokaj decidpovuloj kaj kapablas konvinki ilin, ke valoras investi en la esperantistan agadon, ĉar ĝi videble servas al la urbo. FREŜO estas organizata de tri familioj: Frenzkowski, Gielert kaj Zdankowski (kaj Waclava Ledzińska). Ili estas esperantistoj, kaj malgraŭ tio laboras... konkorde.

Pli ol sesdek partoprenantoj el Pollando, Britio, Francio, Germanio, Hispanio kaj Ruslando estis tre kontentaj pro la nova loko de FREŜO. Ĝi okazis en la kvartalo Kortowo, kiu apartenas al Varmia-Mazuria Universitato. Kortowo ŝanĝiĝas somere en vastan ripozejon por studentoj kaj infanoj kaj trapasantaj turistoj. Ĉirkaŭis nin verdaj arboj, blua lago, gajaj gejunuloj kaj brila suno.

La programo estis tiel planita, ke la partoprenantoj rajtis ĝui la belan tempon laŭvole, sed havis eblecon partopreni interesajn ekskursojn, ĉeesti piknikojn, kaj partopreni seriozajn prelegojn, kiel tiujn de Aleksander Korĵenkov pri Mark Zamenhof aŭ de Halina Gorecka pri Kaliningrado, kiu situas apenaŭ 130 km for de Olŝtino.

Ĉiutage okazis kvizoj, gvidataj de Marian Zdankowski. Li estas vera majstro de tiuspeca intelekta distro, kiu kontribuas plialtigon de la scio pri Esperanto kaj ĝia movado. La partoprenantoj de la kvizo rivaladas por gajni tute valorajn premiojn. Ĉi-jare venkis:

1. Mirosława Kubicka,
2. Teresa Pomorska,
3. Ewa Caban,
4. Stephen Lyons,
5. Halina Oleszek.

Krome okazis prelegoj pri historio kaj antikvaĵoj de Varmia-Mazuria regiono, pri Feliks Nowowiejski kaj Maria Konopnicka. En la programo estis ankaŭ ekskurso al Barczewo, la naskiĝurbo de Feliks Nowowiejski, kie oni vizitis muzeon dediĉitan al la komponisto, kelkajn preĝejojn kaj iaman sinagogon; vizito de muzeo de Varmio kaj Mazurio en la Olŝtina kastelo; spektaklo en la planetario; promenado en la arbarĝardeno en Kudypy apud Olsztyn, kie ni vidis, kiel kreskas plantita unu jaron antaŭe Lariko-Ludoviko, memoriganta la 150-an naskiĝdatrevenon de Zamenhof.

FREŜO, daŭre refreŝigata, indas pli vastan partoprenon de esperantistoj.

Roman Dobrzyński

GES: Esperantistoj politikumas

La unuan Grandpolian Esperanto-Someron (GES-1) en Wągrowiec 7–11 jul 2010 partoprenis 42 personoj el kvin landoj. Ĝi estis serioze traktata de la urbaj kaj distriktaĵaj instancoj, kaj la malfermo, planita en la loka kulturdomo, okazis en la urbodomo, kien nin ĉiujn invitis kaj akceptis la urbestro.

Okazis multaj politikaj diskutoj kaj klarigoj, ke politika agado estas nepre bezonata, se ni volas plu sukcese diskonigi Esperanton. La diskutojn partoprenis d-ro Eŭgeno Macko el Germanio, vicprezidanto de EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto). Unu diskuton partoprenis ankaŭ asistanto de la eŭropa parlamentano Marko Siwiec.

En la kulturdomo okazis ankaŭ diskutoj, prelegoj kaj prezentado de la monologo *D-ro Esperanto* (de Mario Migliucci) fare de Helena Biskup. Koncerto de JoMo aranĝita por la urba publiko en amfiteatro, same vesperaj kantadoj faris specialan etoson. Pri tiuj du gravaj eventoj informis multaj afiŝoj en la tuta urbo Wągrowiec. Unu tagon de GES okupis interesa busa ekskurso al la malnova pollanda ĉefurbo Gniezno, poste ni veturis per la historia mallarĝa fervojo kaj vizitis la interesan Ĵurasan Parkon.

La fermon partoprenis la starosto (distriktestro), kiu promesis subtenon de nia estonta agado kaj jam decidis donaci por la lokaj esperantistoj sidejon, kiu estos samtempe oficejo por la baldaŭ registrotita EDE-Pollando. La starosto promesis lerni Esperanton kaj subskribi liston por subteni la interpelacion de prof. Krystyna Łybacka al la parlamento de Pollando.

GES-1 estis notita en la oficiala retejo de la urbo; lokaj amaskomunikiloj raportis pri ĝi. La ĉeestantoj partoprenis la ekumenan diservon, prezentitan en la pola kaj Esperanto lingvoj kiun partoprenis ankaŭ la starosto kun sia familio.

La partoprenantoj de GES promesis apogi la poresperantan interpelacion de prof. Krystyna Łybacka per kolekto de cent mil subskriboj. Antaŭ GES en Malborko kaj Gdinio kaj dum GES mem oni kolektis kelkajn milojn da subskriboj. Inter la subskribantoj estas la distriktestroj de Wągrowiec kaj Malborko, la urbestro kaj vicurbestro de Malborko kaj la prezidanto de urba konsilantaro de Malborko kaj kelkaj urbkonsilianoj de Wągrowiec kaj Malborko.

Stanisław Rynduch



IEI-oficejo en Hago (Fotis Shanne van Elk)

IEI ekzistas 80 jarojn

En 1930 Andreo Cseh kaj Julia Isbrucker fondis Internacian Esperanto-Instituton (IEI) en Hago, Nederlando. Ili celis organizi la Ĉe-metodan instruadon en la mondo kaj krei novajn Ĉe-instruistojn. La iniciatintoj aĉetis en 1932 domon en Riouwstraat 172 kiel oficejon.

Nun, en 2010, tiu celo ne plu sole validas. La fondaĵo kreskis al centro de Esperanta kulturo, en kiu la eduka aspekto tamen daŭre reflektiĝas en la agado. IEI ekzemple estas la respondeca institucio de la Esperanta katedro en la universitato de Amsterdamo kaj ĝi salajras la tian profesoron dr. Wim Jansen.

Por festi sian 80-jaran ekziston, IEI reeldonis ĉi-jare *Konversacian Vortaron*, kiu enhavas la popularajn vortojn de la Ĉe-kurso. En 1930 ĝin kompilis Cseh. La leksikono, modernigita, aperas nun kun nova elemento — 50 spritaj desegnoj, subtenantaj vortdifinojn.

Post la apero de *Vortoj de Andreo Cseh* (1984), *Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh* (Katalin Smidéliusz, 1995), kaj *Vivo de Andreo Cseh* (Ed Borsboom, 2003), ni disponas kvaran gravan dokumenton pri la konata pedagogo.

Ed Borsboom

Oktoĉbrofesto en septembro

La 18an de septembro je 10h30 esperantistoj renkontiĝos en Munkeno okaze de la inaŭguro de la bierfestivalo *Oktoĉbrofesto*.

La unua aliĝinta *Ondo*-leganto de eksterlando ricevos unu litron de la fama Oktoĉbrofesta biero!

www.esperanto-muenchen.de

Fritz Hilpert

ĈEP: Printempo en junio

15–23 jun 2010 jaro okazis en Mielno (pitoreska ripozloko ĉe la Balta Maro) la 32a Ĉebalta Esperantista Printempo. Ĝin partoprenis 87 esperantistoj el eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj. Pri la internacia karaktero de nia aranĝo atestis naciaj flagoj de ĉiuj landoj, el kiuj venis gesamideanoj.

Ĉi-jara ĈET havis solenan karakteron, ĉar ĝi estis organizita la dudekan fojon sinsekve fare de Czesław Baranowski, prezidanto de la Koŝalina Filio de PEA. Ankaŭ la 20an fojon ĉeestis la solenan inaŭguron Zbigniew Choiński, komunumestro de Mielno kaj honora protektanto de la aranĝo. Laŭ tradicio la solenan inaŭguron partoprenis ankaŭ Henryk Stakuć, direktoro de Sporta Hotelo, en kiu ĉiujare okazas la aranĝo.

Post la alparoloj kaj disdono de diplomoj pro multfoja aktiva partopreno en ĈEToj sekvis distra parto kun belaj kantoj en Esperanto, interalie, pri Mielno kaj Koszalin. La unuan tagon finis interkonatiĝa vespero.

La sekvontan tagon komenciĝis realigado de la interesa kaj varia ĈEP-programo. En ĉiutaga programo troviĝis prelegoj kaj prezentado de filmoj aŭ fotoj. Tre interesajn filmojn montris Roman Dobrzyński kaj li ankaŭ interese prelegis pri Frederiko Chopin. Tre plaĉis al ĉiuj belaj fotoprezentadoj kiujn preparis Czesław Baranowski.

Ĉiutage posttagmeze ariĝis kantemuloj por lerni novajn kantojn kun akordiona akompano de la nelacigebla Urszula Giercarz. Tre kontentaj estis ĉiuj pro lingvoperfektigado en tri grupoj. Kun veraj komencantoj laboris Stanisław Mandrak, instruante Esperanton laŭ rekta metodo. Kun progresintoj en du apartaj lokoj okupiĝis Roman Dobrzyński kaj Czesław Baranowski.

En Mielno ĉiuj havis okazon ne nur plibonigi sian lingvokonon, sed ankaŭ restarigi la sanon kaj distri sin laŭplaĉe. Dum la unua ekskursotago esperantistoj vizitis belegan ĝardenon en Dobrzyca kaj la urbon Kołobrzeg kaj belan havenon kun ĉemarborda parko. Dum la dua ekskursotago esperantistoj vizitis la belegan kapelon de S-ta Maria sur la monto Chełmska kaj konatiĝis kun la distrikta urbo Koszalin.

Impresplena estis ankaŭ la adiaŭa vespero ĉe bivakfajro kun gaja kantado, dancado, kolbasetrostado kaj biertrinkado.

Czesław Baranowski

La 46ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn 26 jun – 4 jul akceptis la orient-litovia urbo Visaginas, proksime al la landlimoj kun Latvio kaj Belorusio. Ĉi tiu multnacia urbo, en kiu litovoj estas minoritato, estas la plej juna urbo en Litovio, ĝi aĝas nur 35 jarojn, kaj ĝia ekesto ŝuldiĝas al la ekkonstruo de la Ignalina nuklea elektrocentralo en 1975. La urbon ĉirkaŭas pinarbaroj, altegaj pinoj abundas ankaŭ en la urbo mem, danke al kio la aero estas bonega.

Pli ol 150 partoprenantojn el 18 landoj gastigis la Profesia Studcentro pri teknologio kaj entreprenado, disponiginta al BET ĉiujn necesajn teknikajn ekipaĵojn por prelegoj, studhoroj kaj koncertoj. Dezirantoj plibonigi siajn lingvajn konojn vizitis lecionojn de diversnivelaĵoj ĉiutagaj kursoj.

Por kleriĝemuloj funkciis Somera Universitato. La prelego-salonoj estis plen-plenaj, tion kaŭzis ne nur altnivelaj prelegantoj kaj interesaj temoj, sed ankaŭ senalternativo de la programo por spertuloj. Petras Ĉeliauskas, la aŭtoro de la libro *Litovio dum jarcentoj*, prezentis ciklon da prelegoj pri la historio de Litovio, pri la origino kaj specifaj trajtoj de la litova lingvo, pri sia regiono Ĵemajtio, ĝiaj popolo kaj dialekto, kaj pri la batalo ĉe Grünwald, kiu havas ĉi-julie la 600-jaran jubileon.

La 29an de junio, je la Rom-katolika tago de S-taj Petro kaj Paŭlo, oni honoris per kverkaj kronoj tiunomajn BETanojn. Ĉi tiu tradicio estis surprizo por multaj el la alilandanoj. Por kvardeko da partoprenantoj la urbestro de Visaginas aranĝis akcepton kun malmultaj paroloj kaj abunda regalo manĝa kaj drinka.

Okazis ekskurso al la ĉefa vidindaĵo de Visaginas, Ignalina nuklea elektrocentralo, kies du blokoj estis haltigitaj en 2005 kaj 2009. Alia ekskurso ebligis konatiĝon kun la naturaj kaj arkitekturaj riĉaĵoj de Litovio en la Aukštaitija nacia parko. Estis vizitata unika etnografia muzeo de abelbredado en Stripenkiai. En la vilaĝo Ginučiai la celo estis akvomuelejo, kie konserviĝis la malnovaj instalaĵoj. Plia vizito estis al la ligna preĝejo en Palušė kaj la monto Lada-kalnīs kun belega vidaĵo al ses lagoj.

La riĉa koncerta programo de BET efektiviĝis nur parte: pro la morto de la Litovia eksprezidento Algirdas Brazauskas estis anoncita tritaga funebro. Sed antaŭ tio la multnacia Visaginas estis arte prezentita de la rusaj kantensemblo *Rodnik* kaj dancensemblo *Rodničok*, la



ukraina folkloro ensemblo *Kalyna*, kantistino Anna Turanosova-Abra. Kaj, kompreneble, la loka esperantista familia bando *Asorti*.

Kutime por la Litoviaj BEToj, ankaŭ la nuna estis bone organizita. La ĉiutaga gazeto *La argenta gruo* publikigis la aktualan programon, raportojn pri la okazintaĵoj, anoncojn, kaj multajn fotojn (bedaŭrinde, preskoboldo estis senripoza). Bone prizorgita estis manĝado en la studcentro, kiu ne ignoris la bezonojn de vegetaranoj. Pro la varmega vetero multaj fuĝis al la urba lago, kaj la vesperojn oni povis agrable pasigi en liberaera bierejo en amika babilado.

Halina Gorecka

Sur la monto Ĉantorio

Kvankam la 20an de junio pluvegis, kaj en Pollando samtempe okazis prezidenta elektado, ĉi-jaran dimanĉan kunvenon sur la monto Ĉantorio partoprenis dudek esperantistoj el Ĉeĥio, Slovakio kaj Pollando.

El la ĉeĥa flanko grimpis supren kvin gesamideanoj. Ceteraj partoprenantoj uzis seĝtelferon el la pollanda flanko. Malgraŭ la malbona vetero tiu kunveno pasis, kiel ĉiam, en bona etoso. Unue ni omaĝis la memoron de forpasintaj gesamideanoj, kiuj partoprenadis ĉi tiun renkontiĝon. Poste ni kantis, babilis, kaj regis bona etoso. Ĉiuj kredas, ke venontjare estos pli bona vetero kaj partoprenos pli multe da gesamideanoj el ĉiuj tri landoj.

Ladislav Němec

En Lančov estis gaje (*Fotis Boban Ĥepa*)



Eventoj

Lingva kaj turisma seminario

La Esperanto-Asocio *Saksa Svisio*, fine de junio laŭ tradicio organizis sian jarkulminon, *Lingva kaj Turisma Seminario*, en la najbara Ĉeĥio — ĉi-foje en la pitoreska nordokcidentbohemia vilaĝo Studený. Feliĉe oni ĝustatempe riparitis provizore la aliran ponton al la pensio *Kamzik* (Ĉamo), detruitan pro inundo de la intertempe trankvila rivereto.

Lerte kaj majstre la lingvan parton gvidis profesorino Sabine Fiedler el Leipzig kaj sinjorino Teresa Nemere el la pola Toruń. Sabine Fiedler proksimigis nin al la vasta kampo de proverbaro en Esperanto, kaj Teresa Nemere prelegis pri naciaj kutimoj en Pollando, je ekzemplo de Toruń-aj spickukoj eĉ kun gustumbeleo.

Vendreda ekskurso al nordokcidentbohemiaj vidindaĵoj Tolnstejn kaj Varnsdorf ebligis belegajn elrigardojn. Kulmino estis sendube la vizito de la tombejo en la vilaĝo Horní Podluží, kie troviĝas memorŝtono el la jaro 1927 sur la tombo de la fama nordbohemia esperantisto Julius Patzelt — samtempulo kaj korespondamiko de L.L. Zamenhof kaj regiona Esperanto-instruisto.

Norbert Karbe

Ĉeĥio: Ĉiam malpli amasa SET

Estas ĉiam pli malfacile allogi infanojn al amatora tendaro, kiam ankaŭ la najbaraj profesiaj (entreprenaj) tendaroj havis ĉi-jare malmultajn. En la unua etapo de la tradicia Somera Esperanto-Tendaro en la ĉeĥa urbo Lančov estis kvardeko da infanoj, en la dua tridek kaj en la tria nur dek kvin.

Venis al SET nur ĉeĥaj infanoj, sole deko por Esperanto, la aliaj lernis la anglan. La juna Esperanto-instruisto Miroslav Hruška provis instrui laŭ nova bilda metodo, kiun evoluigis d-ro Pavel Lehký. Ankaŭ la finan renkontiĝon de eksaj tendaranoj ĉi-jare partoprenis malmultaj personoj, ĉirkaŭ dudek. Eble pro la inundoj en Bohemio, kiuj malebligis al multaj homoj forlasi siajn hejmojn. La trian etapon partoprenis plenkreska itala esperantisto.

La tendaro bezonus pli multajn eksterlandajn esperantistojn, sed bedaŭrinde ofte aliĝas nur ekster-eŭropaj, kiuj bezonas specialan invitilon, garantiatan per enorma monsumo, kiun la tendaro ne posedas. La venontjara tendaro estos jam la 59a.

Miroslav Malovec

Instruantoj instruas kaj lernas

Dum la unuaj dek unu tagoj de aŭgusto en la urbo Taiyuan (provinco Shanxi, norda Ĉinio) okazis seminario de la ĉina sekcio de ILEI kun 51 ĉinaj kaj 6 alilandaj partoprenantoj.

Entute okazis 13 prelegoj (inkluzive de unu prelego pere de Skajpo) pri edukado, metodoj de Esperanto-instruado, ktp, kvar raportoj pri Esperanto-instruado en ĉinaj kaj japanaj lernejoj, du demonstraj lecionoj kaj kvar Esperanto-kursoj (du por pli ol 25 progresantoj, du por 50 infanoj). Ni ankaŭ dissendis la prelegojn kaj kurs-instruadon rete. Ĉiutage pluraj enlandaj esperantistoj rete ĉeestis nian seminarion.

4 aŭg okazis kunsido de la sekcio. Gong Xiaofeng, la estrino de la ĉina sekcio de ILEI, faris laborraporton kaj anoncis, ke 8–15 aŭg 2011 en Tianjin okazos la venonta seminario samtempe kun la unua komuna seminario de ĉina, japana kaj korea sekcioj de ILEI.

La instruistoj estis spertaj kaj sindonemaj; diversaj metodoj kaj manieroj estis uzataj dum la instruado. La kursanoj estas ege lernemaj, ili kaptis la okazon praktiki nian lingvon. Ni ankaŭ agrable pasigis la tempon dum la vesperaj programoj kaj ekskursoj.

Gong Xiaofeng

Du agrablaj semajnoj

Entute 29 homoj partoprenis en la 8-a SOMERE (SOMera MEzeŭropa RENkontiĝo), kiun okazigis la asocio EsperantoLand de 23 jul ĝis 6 aŭg 2010, meze de arbaro apud la urbeto Jünkerath (sude de Kolonjo, Germanio, en la Eifel-regiono). La partoprenantaro venis el Pollando, Nederlando, Belgio, Germanio kaj Francio — bele internacia grupo, en kiu Esperanto estis la ĉiutaga lingvo.

La programo enhavis diversajn ekskursojn en la regiono — de vulkana pado kaj vulkanĝardeno al vizitoj ekzemple de la urbetoj Kronenburg, Hillesheim kaj Bad Münstereifel. Multaj promenoj okazis en la apuda arbaro kaj kelkaj vizitis la lagon de Kronenburg. Endome ni ĝuis la grandan ludosalonon de la domo, orgenan kaj pianan koncertojn de Ludger Schmeink kaj prezentadon de intervjuo pri amo. Por senstreĉiĝo taŭgis interalie cirklodanco kaj gimnastiko (Danka Leyk kaj Anna Dupéchaud), la inventemon stimulis kreado de fabeloj (organizis Catherine Royaux) kaj iom da informoj pri la aliaj



Instruantoj kaj lernantoj en Taiyuan

oni provis diveni kaj eltrovi per la ludo “La nuda vero”. La progresantoj povis partopreni en la lingvaj ekzercoj, kiujn plurfoje proponis Gunter Neue. Flanke de la oficialaj programoj la babilado en la domo kaj la ĝardeno, dum manĝoj, kafumado kaj promenoj kiel kutime ludis gravan rolon.

En la venonta jaro SOMERE verŝajne daŭros nur unu semajnon. Ni planas okazigi ĝin en la dua aŭgusta semajno, eble apud la maro en Belgio aŭ apuda lando, supozeble post la dua Internacia Kongreso de EsperantoLand.

Lu Wunsch-Rolshoven

Sukcesa somero en Grésillon

“Komenciĝas!”, — flustras spektantino kiu babilis kun sia najbaro... Jes ĉiuj spektantoj estis okul- kaj orelfrapitaj de tiu homo kiu subite kaj kun basa voĉo silentigas babilantaron en Salono Zamenhof de Grésillon.

“Silentu! Estas la nokto... kaj ĉiuj dormas en la domo...”

Tiu homo, kiu tiel abrupte parolas estas Ludoviko Lazaro. Kaj dum pli ol unu horo Ludoviko babilas ne nur antaŭ ni sed ankaŭ al ni. Kaj li ne nur babilas, li ankaŭ tostas kun ni, petas helpon por preparado de medikamento... Kaj iom post iom, dum sia unuvoĉa parolado, li malkovras al ni multajn el siaj travivaĵoj, kiel juda junulo en Bjalistoko, kiel okulkuracisto en Varsovio, kaj kiel Doktoro Esperanto en la mondo.

Multon el tio ni jam konis post legado en libroj aŭ rakonto de Esperanto-instruistoj pri la vivo de Zamenhof. Sed ni ĉiuj, kiuj ĉeestis kiel spektantoj en Salono Zamenhof de Grésillon, ne nur konas la vivon de Ludoviko Lazaro, ni nun konas pli: ni vidis lin, ni aŭdis lin.

Tiu spektaklo de Georgo Handzlik estis sendube la pinto de ĉi-jara somera programo en Grésillon. Kaj por ke plej multaj vizitantoj de Grésillon povu ĝui

la spektaklon, ĝi okazis trifoje, kaj spektis ĝin ne nur staĝanoj sed ankaŭ membroj de lokaj Esperanto-asocioj de la regiono post reklamo de la Kulturdomo.

La kastelo Grésillon ja estas malfermata al ĉiuj esperantistoj por ĝui, ĉu tutan semajnon ĉu nur programeron iun tagon. Kaj do ĉi-somere homoj venis al Grésillon ne nur por kursoj de Esperanto! Kompreneble, la plej granda parto estis ja staĝanoj, kiuj venis por firmigi sian konon de Esperanto elektinte inter la tri niveloj de kursoj, kun Daniel Biro-Walker, Christophe Chazarein, Thierry Saladin, Evgeni Georgiev, Jean-Luc Kristos, Nina Korĵenevskaja, François Lo Jacomo kaj Aurora Bute. Esperanto-spertuloj dediĉis tutan semajnon al traduklaboro de Edmond Privat sub la gvidado de Tomasz Chmielik.

La ĉi-somera programo havis du celojn: akcepti la kutimajn vizitantojn de la kastelo per la kutima programo de kursoj de Esperanto kaj aktivaĵoj en Esperanto, kaj allogi novajn vizitantojn per novaj programoj kaj novaj agantoj por la kursoj kaj la distra programo. El tio rezultis altnivela bunta programo, kiu allogis sufiĉe da esperantistoj por bone pleniĝi la kastelon!

Tiel okazis ne nur kursoj de Esperanto, sed ankaŭ spektakloj kaj prelegoj al kiuj aldoniĝis multaj sukcesaj aktivaĵoj: Tajĝiĉjuano kun Claude Bensimon, astronomio kun Patrick Lagrange, librobindado kun Caroline Mauboussin, kantoj kun Jean-Luc Kristos, lingvaj ludoj kun François Lo Jacomo, verkado de poemoj kun Lorenzo Tomezzoli, teatrumado kun Nina Korĵenevskaja kaj brazilaj dancoj kun Eida Messias Lima. Kaj plie, Georgo Handzlik ne nur teatrumis trifoje en Grésillon, li ankaŭ rolis kiel “la bardo sen barbo” kantante dum du vesperoj akompanate de gitaro. Kaj li ankaŭ instruis Esperanton dum la tuta semajno!

Xavier Godivier

Unufraze

★ En la Havana UK estis anoncita la fondo de la organizaĵo “Esperanto por UN”, kiu laboros por altigi la profilon de Eo ĉe UN k por disvastigi informojn pri UN inter la e-istoj. (GK UEA)

★ La Senato de la Universitato en Bjaliŝtoko decidis honori profesoron Reinhard Selten, e-iston Nobel-premiitan pri ekonomio, per la titolo “doktoro honoris causa”. (BES)

★ La usona verkisto Joseph Skibell publikigis novan anglalingvan romanon *A Curable Romantic* en kiu agas Zamenhof k aliaj esperantistoj. (Esperanto-rus-informoj)

★ La franca reĝisoro Jean-Dominique Gautier preparas dokumentan filmon pri Eo; la filmo, kiu aperos en marto 2011, estos spektbla en la ses laborlingvoj de UN k en Eo. (Henri Masson)

★ E-istaj fakuloj el 12 landoj k pluraj bulgaraj sciencistoj prelegis en la 2a seminario “Apliko de Esperanto en la profesia agado”, kiu okazis 11-14 jun en la Internacia Universitato Karlovo, Bulgario. (Boĵidar Leonov)

★ Ramon Perera k Roger Sanjaume prelegis pri Eo ĉe Granda Oriento, framaŝona loĝio de Katalunio; kvankam la prelego estis malfermita al ĝenerala publiko, ĝi okazis kadre de framaŝona ritualo. (*Kataluna Esperantisto*)

★ 4–6 jun en Valencio la Alternativan Foiiron partoprenis esperantistoj el Kataluna E-Asocio, Valencia E-Grupo, EDE k SAT. (*Kataluna Esperantisto*)

★ En la universitato Masaryk (Brno, Ĉeĥio) ses studentoj finis la nedevigan kurson Esperanto 2. (Josef Vojáček)

★ Nepala E-Asocio okazigis E-kurson ĉe la landa filio de Universal Love Brotherhood Association. (*Esperanto en Azio*)

★ En aŭgusto komenciĝis E-kurso ĉe la Ŝtata Universitato UNICAMP en Campinas (Brazilo), kiun gvidas prof. Jozefo Lunazzi. (Universitato)

★ La Konsulo de la E-Civito Giorgio Silfer anoncis, ke li ne kandidatiĝos por ĉi tiu posteno en la venontaj elektoj, sed estos disponebla por gvidi la estontan fondumon *Pro Esperanto*. (HeKo)

★ *Tempo*, la gazeto de Kroata E-Ligo danke al plendoj de e-istoj plu aperas helpe de subvencio de la kulturministerio. (*Tempo*)

★ La Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj estis la ĉeftemo de la Kolokvo pri lingvopolitikoj okazinta 17 aŭg ĉe la E-Domo en Ĉaŭdefono. (HeKo)



Kacrin: Aleks Kerbel, la tradukinto de *Dek du seĝoj* kaj *Ora bovido* de Ilf/Petrov prelegis pri rusa humuro. (*Fotis Amri Wandel*)

Israelanoj kongresis en Kacrin

Ankaŭ konata per la antaŭa nomo KIES (Komuna Israela Esperanto-Semajnfino), la Israela Kongreso, aŭ la 11a tutlanda semajnfina renkontiĝo, okazis fine de majo en la norda urbeto Kacrin. Partoprenis 30 personoj, inkluzive de gastoj el Germanio. La partoprenantoj estis malpli multaj ol en la pasintjara KIES en Pac-Oazo, tre verŝajne pro la pli granda distanco el Tel Avivo.

La kleriga programo inkluzivis prelegojn pri la ĉeftemo: Josef Ŝemer prelegis pri juda humuro kaj Aleks Kerbel pri rusa humuro. Oni spektis lumbildojn pri Kubo, kaj okazis ekskursoj al diversaj interesaj lokoj en Kacrin kaj al ĝia bela natura ĉirkaŭaĵo, kiel la bazalta akvoriĉa kanjono Zavitan, la natura rezervejo kaj antikva juda fortikaĵo Gamla, kaj la nova pendanta ponto sur la jordana fonto Banjas. La vespera distra parto inkluzivis sociajn lingvajn ludojn por komencantoj kaj progresantoj, aktivigon per kartoj, ventro-dancadon kaj kvizon.

Kiel dum la pasinta KIES en oktobro 2009 (vd. LOdE-182), okazis speciala programo por la eksterlandaj partoprenantoj. Oni organizis antaŭ-kongresan sestagan ekskurson al Jerusalemo, la Morta Maro, Negev (suda dezerta regiono de Israelo), la Ruĝa Maro kaj Jordano (i.a. al Petra, unu el la sep novaj mirakloj de la mondo), kaj post-kongresan dutagan ekskurson en Galileo (i.a. Nazareto, Hajfo, Akko). Por la venontjara kongreso (marto 2011) oni esperas havi multajn eksterlandajn gastojn.

Amri Wandel

Serbio: La movado maljuniĝas

En la Beograda lernejo *Veljko Ramadanović* por gelnantoj kun difektita vidpovo 25–27 jun naŭdek reprezentantoj de Esperanto-societoj el ĉiuj lokoj de Serbio kaj kelkaj gastoj el najbaraj landoj partoprenis la trian kongreson de serbiaj esperantistoj. Ĝin kunorganizis Esperanto-societo *Radomir Klajić* kaj societo de blindaj esperantistoj *La suda stelo* ambaŭ el Beogrado.

Apartan atenton havis la lernejo, kie Esperanto estas instruata de 1920, do naŭdek jarojn, preskaŭ de la fondiĝo de la lernejo.

Kadre de la kongresa ĉeftemo “Eŭropa integriĝo kaj Esperanto” okazis prelegoj pri ekonomiaj aspektoj de lernado de Esperanto, pri Esperanta literaturo en Eŭropo kaj en Serbio, pri lernado de Esperanto, pri strategia plano de UEA, informado kaj pri influo de internacia lingvo en ligoj de blindaj esperantistoj. Enkondukaj prelegoj aperis en speciala kongresa numero de *Beograda Verda Stelo*.

La kongresanoj trarigardis muzeon de la lernejo, kaj poste estis organizita duontaga ekskurso tra Beogrado kaj vizito al la nova TV-turo Avala, kiu estis detruita dum NATO-bombardado de Serbio, kaj al Tombo de nekonata heroo.

La kongresanoj konstatis, ke la Esperanto-movado en Serbio fariĝas pli maljuna, kaj konkludis, ke oni devas pli bone propagandi la internacian lingvon.

Dimitrije Janičić

Esperanto-skribiloj

(Landa Agado) La Esperanto-Centro *Eventoj* en Hungario produktis skribilojn kun kaj por Esperanto-reklamo. Ili estis faritaj en du versioj: unu kun normala kaj unu kun pli eleganta, brilanta aspekto.

La produktadon de tiuj skribiloj financis Fondaĵo Esperanto ĉe *Eventoj*, surbaze de la ricevita subvencio de 1% de personaj impostoj de civitanoj.

László Szilvási



La esperanta nacio

Dafydd ab Iago el Bruselo

Esperantistoj vivas dise en Eŭropo sen nacio kiun ilin unuigas. Same vivas naŭ ĝis dek ses milionoj da romaoj (aŭ ciganoj, se vi preferas la iom negativan sed pli tradician vorton). Al Eŭropo romaoj prezentas problemon, aŭ defion en la lingvaĵo de politikistoj. Unuflanke, ili vere enkorpiĝas la Eŭropan filozofion, vojaĝante de lando al lando, kaj parolante siajn gepatrajn lingvojn kaj la diversajn ŝtatajn lingvojn de la Eŭropa Unio. Aliflanke, dudek jarojn post la fino de la komunismaj registaroj en la orienta kaj centra Eŭropo, romaoj daŭre ne integriĝas kun la lokaj popoloj.

Por tio en Eŭropo eĉ ne mankas mono. Estas tiom da fondusoj, ke la avara Rumanio eĉ ne povos plene uzi la monon, kiun Eŭropa Unio pretas doni. Inter 2007 kaj 2013 ĉirkaŭ 13 miliardoj da eŭroj de la Eŭropa Socia Fonduso estos elspezitaj por integriĝo de romaoj kaj aliaj grupoj en malfacilaj sociaj situacioj. La mono celas faciligi aliron al loĝejoj, edukado, trejnado kaj laboro. “Mankas ne mono, sed la bona vojo ĝin uzi”, — agnoskas funkciulo en Bruselo.

Laŭ la burokrata tradicio de Bruselo, eŭropaj funkciuloj nun kontraktas bone pagatajn eksterajn fakulojn por studi la problemon kaj emfazi la plej efikajn projektojn kaj strategiojn.

La franca ŝtata sekretario respondeca pri eŭropaj aferoj Pierre Lellouche ĉi-somere atakis Bruselon pro — laŭ li — mankanta efikeco spite al troa elspezo de mono pri integrigaj strategioj. Li petis de Belgio, kiu nun prezidas EU, kaj de aliaj membro-ŝtatoj urĝan debaton pri integriĝo de romaoj. La franca politikisto kritikis problemojn de la junulara krimo kaj la trafiko de infanoj kaj junuloj. Lellouche ankaŭ kritikis la alvenon en Francio de “homoj kiuj ne volas integriĝi en socio” kaj ties malemon respondi por si mem.

Francaj politikistoj rimarkigas, ke, ekzemple, Bulgario, Rumanio kaj Slovakio malsukcesis starigi efikan politikon por integriĝi romaojn kaj faciligi al ili laborpostenojn, loĝejoj kaj sociajn rimedojn por partopreni la “normalan” vivon.

Ankaŭ en Bruselo oni komentas ke orient- kaj centreŭropaj ŝtatoj ne profitas de la eŭropaj financaj ebloj por kunlabori kun romaoj kaj iliaj asocioj. Evidente, Rumanio estas la plej malbona en la klaso. Estas ĉirkaŭ 2 milionoj da romaoj en Rumanio, kvankam la registaro en Bukareŝto insistas pri nur 537 mil romaoj. Aliaj landoj kun grandaj romaaj komunumoj estas Slovakio (500 mil) kaj Bulgario (750 mil).



Foto el Wikimediacommons

“Rumanio ne faris sian laboron, — klarigis romaa aktivulo Ciprian Necula al unu el la raraj francaj ĵurnalistoj. kiuj enketis en Rumanio mem pri la situacio de romaoj. — La ŝtato permesis flori al homa trafiko kaj prostituado kaj surpapere kreis kelkajn projektojn celante kontentigi eŭropanojn”.

Ĉi-somere la franca prezidanto Nicolas Sarkozy instigis al la detruado de ĉ. 500 neleĝaj romaaj tendaroj en Francio. Francio estas la plej elstara ekzemplo de kontraŭromaa politiko, sed ne la sola. Italio en 2008 eligis milojn da romaoj al Rumanio kaj Bulgario. Tia politiko daŭras. Ankaŭ Germanio, Danlando kaj Svedio plu resendas “hejmen” milojn da romaoj, precipe al Kosovo, kie ili frontas diskriminacion, terurajn vivokondiĉojn kaj senesperon. “Estas klara kaj sistema programo de EU-registaroj celanta romaojn”, — diras Anneliese Baldaccini, advokato ĉe Amnesty International en Bruselo.

“Malriĉeco, diskriminacio kaj aro da aliaj aferoj faris neeltenebla la vivon de romaoj en iliaj gepatraj landoj”, — diras Robert Kushen, direktoro de la Eŭropa Centro por la Rajtoj de Romaoj en Budapeŝto. Li alvokas, ke EU sekurigu por romaoj la rajton de libera movado en la Unio.

Tamen ne ŝajnas, ke la Eŭropa Komisiono faros multe por protekti romaojn uzante la bazan rajton de libera movado. “La ebleco ellandigi la romaojn estas respondeco de la ŝtatoj-membroj”, — konstatas Matthew Newman, porparolanto de Viviane Reding, la eŭropa respondeculo pri justico. La ŝtatoj mem decidis kiel apliki la principon de libera movado. En aprilo ĉi-jara Reding mem agnoskis, ke la situacio de la romaoj eĉ plimalboniĝis.

REU kaj la Peterburga REK

En la julia *Ondo* mi legis du kritikajn notojn pri la Peterburga REK, kiu okazis fine de majo. Kvankam pasis jam tri monatoj post la fino de la kongreso, aspektas natura almenaŭ nun koncize reagi nome de REU.

Sendube ĉiuj menciitaj en du artikoloj fuŝoj estis signifaj makuloj, kaj mi pardonpetas al ĉiuj (inkluzive de Aleksander Korĵenkov), kiuj iel suferis pro mallertaj organizaj nuancoj de REK. Ankaŭ estas tre bedaŭrinde, ke neniu verkis ion alian por *La Ondo* (kvankam kelkaj homoj estis petitaj), sekve tie ape-



ris nur negativaj impresoj pri la kongreso, kiu baze estis sukcesa kaj ricevis plurnajn dankojn de la partoprenintoj.

Krome menciendas, ke la estraro de REU (nek tiama, nek des pli la nuna,

elektiĝinta ĝuste en Peterburgo) ne havis rilaton al teknika organizado de la kongreso. Tio ne estas pravigo de la fuŝoj, sed nur klarigo, ke en REK pri tiaj okupiĝis homo, kiu ne havis sufiĉan sperton, kio kaŭzis kelkajn problemojn.

Samtempe mi riskas promesi, ke por sekvaj E-renkontiĝoj, kiujn (kun)organizaros REU, ni konsideros ne nur bonan sperton, sed ankaŭ malbonan. Ĉiuj esperantistoj estas varme atendataj en la sekva kongreso de REK (kiu okazos oktobro 2011 en Ĉeboksary).

Grigorij Arosev
prezidanto de REU

Venu – vidu – spertu

Dum la lastaj jaroj multaj staĝantoj restadis en Herzberg am Harz — la Esperanto-urbo. Lastatempe, la juna koreino Lee Yun-Seo, alinome Noblina, kiu dum kvaronjaro en movade eventoplena periodo restadis en la Esperanto-urbo, staĝante ĉe Interkultura Centro Herzberg (ICH).

Nur ĉirkaŭ tri monatojn antaŭ la alveno al Herzberg ŝi eklernis la lingvon. Estis por ŝi ĉi tie multaj eblecoj ĉiutage uzi Esperanton kaj lingve kaj movade spertiĝi. La biblioteko de ICH kun ĉ. 7000 libroj, granda gazetarkivo, amaso da filmoj kaj sonmaterialo ktp. estas granda kulturfonto por spertiĝemuloj. Rapide kreskis ŝia parolkapablo en Esperanto. Per lingvaj konsiloj kaj diversaj aktivecoj ĉiutage subtenis ŝin Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar. Ŝi kuraĝe trapasis la KER-ekzamenon B1, kaj eĉ provis siajn “flugilojn” kaj komencis instrui Esperanton en la Esperanto-Centro.

Jen resuma listo el la agadoj de ICH kaj eventoj en la Esperanto-urbo, kiujn nia staĝantino partoprenis:

- Comenius-projekto en Nicolai-lernejo: spertiĝo dum instruado, kontaktoj kun la brita kaj hungara partneroj;
- kontribuado al la konversacia rondo en la gimnazio kaj al la merkreda lingvokurso en ICH, oferto de muzikaj kaj dancprogrameroj dum klubaj festoj kaj kunvenoj;
- helpo al ICH ĉe informtablo, preparo de ekspozicio kaj varbiloj, ordigo de la biblioteko kaj arkivo;
- la studadsesioj pri varbado, kursorganizado, literaturo kaj metodiko aldonis multon al ŝiaj movadaj konoj;
- kulturaj eventoj rilate al germana, regiona kulturo: Paskaj tradicioj, Valpurga nokto, Pafista festo k.a.

Krome ŝi vizitis kelkajn germanajn urbojn, partoprenis la Beneluksan Kongreson en Antverpeno kaj la Germanan-Francan Kongreson en Kaiserslautern. Ŝi ankaŭ faris studvojaĝon al Hungario kun vizito de la Fajsz-biblioteko, Kultura Esperanto-Asocio kaj Hungaria Esperanto-Asocio.

Dum la komune pasigitaj monatoj ŝi fariĝis parto de nia ĉiutaga vivo. Ni esperas, ke ŝi utiligos multon el la movadaj spertoj kaj transdonos ilin ankaŭ al aliaj. Ŝia ekzemplo estu kuraĝigo al aliaj staĝantoj.

Bedaŭrinde ŝi ne povis ĉeesti en julio pliajn eventojn.

Sespersona delegacio el Herzberg, inkluzive de la sekretario de la urbestro, partoprenis komence de julio la Soman Esperanto-Studadon en Slovakio.

Noblina (la kvina de maldekstre) inter stud-sesianoj en la ĝardeno de ICH, kie ŝi prezentis belan dancon. (Foto de ICH)



17–23 jul OSIEK konferencis en la Esperanto-urbo kun 50 partoprenantoj kaj riĉa kultura programo.

Sekvis 24–31 jul la 5a SALO (Somera Arbara Lernejo), tradicia kunferiumado de ĝemelurbaj lernantoj el Góra (Pollando) kaj Herzberg. La 18-membra grupo kun la faka gvido de Zsófia Kóródy multon lernis dum la antaŭtagmezaj lecionoj, ludis, kantis, desegnis, babilis, uzis ĉiun eblon komuniki unu kun la aliaj. La gejunuloj bonege interagadis, aktive kaj harmonie kunlaboris. Per la komunaj ludoj, sportumado, manlaboro, k.s. ekestis vera amikeco.

Nia devizo “Venu – vidu – spertu” estas instigo por estontaj helpemuloj.

Legu pli: <http://esperanto-urbo.de>

ICH

Post dekmonata staĝado

La lastajn dek eventoplenajn monatojn mi pasigis en Herzberg am Harz — la Esperanto-urbo, kiel volontulino ĉe ICH danke al la projekto Grundtvig kadre de la EU-programo “Dumviva Lernado”. Ĉiumonate mi priskribis en *La Ondo* ĉion gravan, kio ligiĝis kun Esperanto, ICH kaj la Esperanto-urbo, ĉar en Herzberg konstante io okazas, kaj la movada kalendaro estas plenplena ĝis la fino de la jaro.

Mi neniam enuis tie, partoprenante seminariojn, fakkunvenojn, lokajn kaj internaciajn aranĝojn, akirante sperton, plenumante variajn taskojn, aktive ĉeestante diversajn urbajn eventojn, festojn, lokajn projektojn kun larĝskala informado kaj varbado por Esperanto, ĉiam animplene kaj entuziasme. Mi dankas al Zsófia Kóródy kaj al Petro Zilvar kiuj ebligis al mi realigon de mia kontrakto en Herzberg.

Sed pri tio vi povis legi en la antaŭaj numeroj de la revuo. Nun mi deziras rakonti pri aliaj spertoj. En Herzberg loĝas kelkaj nacioj, kiuj flegas siajn proprajn kulturojn, religiojn, kutimojn kaj morojn. Sen kvereloj, en Herzberg ĉiuj nacioj vivas amike, estimante apartecon de la aliaj. Tie estas vera Esperantujo, kies etoson oni spertas vizitante, ekzemple, la domon de la geedzoj Harald Schicke (germano) kaj Jeong-ok (koreanino). Ili posedas en la ĉefstrato ginsengo-butikon, en kiu la esperantistoj renkontiĝas la trian jaŭdon de ĉiu monato kaj trovas specifan, neforgeseblan kaj nekutiman etoson, kiu plibonigas ne nur la san-, sed ankaŭ la anim-staton.

En tiu ĉarma urbeto mi komprenis, ke amikeco estas unu el la plej valoraj atingiĝoj de la homara kulturo. Ĝi estas la plej granda havaĵo pri kiu disponas homo, ĉar ĝi respondas al nia plej profunda deziro, al la bezono de komunikado. Tial mi ĉiam volonte revenos al Herzberg al miaj geamikoj, kiuj speciale por mi organizadis ekskursojn, por ke mi ekkonu ilian belan landon, kaj kiuj invitadis min por komune manĝi kaj ekkoni iliajn familianojn...

Kortuŝaj estis por mi la momentoj, kiam en la aviadila akcidento perdis sian vivon la prezidanto de mia lando... Nekonatoj haltigis min surstrate kaj esprimis sian kondolencon, triston, kompaton...

Herzberg estas vizitinda ne nur pro la bela pejzaĝo kaj vera ripozo, ne nur pro la klerigaj aranĝoj de ICH, ne nur pro la interesa historio kaj la informtabuloj en Esperanto, sed ĉefe pro la bonkoraj homoj... La bela, magia urbeto plene meritas sian nomon — la Esperanto-urbo. Venu kaj konvinkiĝu.

Estas multe da laboro tie, kaj konstante mankas volontuloj... Se vi konas Esperanton kaj iom la germanan lingvon, fariĝu volontulo kaj helpu kunkonstrui la Esperanto-urbon.

Małgosia Komarnicka

KAEST revenas en Slovakion

Ekde la 18a ĝis la 21a de novembro 2010 en la okcidentslovakia urbeto Modra-Harmónia okazos nova etapo de KAEST-oj. Ĝin ĉi-foje organizas E@I, kiu en la sama loko organizis ankaŭ SES en 2008 kaj 2009.

KAEST estas mallongigo de Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko.

KAEST konsistas el diversspecaj fakaj prelegoj en Esperanto, kiuj plenumas du celojn:

Al diversaj fakuloj-esperantistoj donas KAEST eblon prezenti sian fakon en “verda lingvo”, konatigi homojn kun ĝi, sciigi pri specifeco de iu konkreta fako, profesio, scienco/tekniko.

Al publiko-partoprenantoj KAEST donas eblon sekvi interesajn prezentojn, ekscii interesaĵojn pri diversaj aferoj, larĝigi sian terminaron kaj diskuti pri sciencaj/teknikaj temoj.

La aranĝo ja komenciĝis en Slovakio (tiam sub la nomo AEST), sed dum la lastaj dek jaroj ĝin tenis viva Petro Chrdle kun siaj helpantoj en Dobřichovice, apud Prago. Nun E@I, kune kun helpemaj slovakiaj esperantistoj transprenis la organizadon de la aranĝo. Tiel post longa tempo KAEST revenas en sian “naskiĝlandon”.



La ĉeftemo de KAEST 2010 estas “Modernaj teknologioj por Esperanto”. Ĉar la organizadon transprenis E@I, ĉi-jare okazos kelkaj ŝanĝoj, kompare kun la ĝisnunaj KAEST-oj en Ĉeĥio. La konferenco plilongiĝos — ĝi

daŭros ekde la ĵaŭda posttagmezo ĝis la dimanĉa tagmezo, por ke povu partopreni ankaŭ homoj de pli foraj landoj. La programo pliriĉiĝis je interesaj kulturaj programeroj kaj je pli da praktika scienco — oni havos eblon “tuŝi” la sciencon, pli aktive vidi ĝian funkciadon.

Ĉi-jare do la programo konsistos el kelkaj partoj:

- prelegoj (en du paralelaj blokoj: ĉeftemaj kaj alitemaj)
- trejnado (Vikipedio, komputila laboro, metiejoj ks.)
- fakaj diskutoj (pri certa temo)
- vespera programo (vingustumado, film-prezento, babilado ks.)

— duontagaj ekskursoj (laŭ interkonsento kaj mendoj)

La ambicio de KAEST 2010 estas oferti lokon por interŝanĝado de informoj pri la plej diversaj fakoj en Esperanto. Ĝi celas ebligi kreskon de la faka uzo de Esperanto kaj riĉigon de la terminologio en Esperanto. Ĉar nur kaze de vere vasta uzeblo de nia lingvo ni povas ĝin fiere prezentadi al la ekstera publiko. Unu el grandaj malavantaĝoj de Esperanto estas ĝia malofta uzeblo en la faka medio. Tiun ĉi mankon volas aranĝoj kiel KAEST provi malgrandigi.

Ni do elkore invitas ĉiujn aliĝi kaj prelegi, aŭ simple aliĝi kaj ĉeesti en KAEST 2010. Se vi deziras kontribui al la aranĝo per prelego, bonvolu kontakti nin kaj proponi vian prelegon.

Detalajn informojn kune kun la aliĝilo vi trovos rete ĉe: www.ikso.net/kaest

Demandojn direktu al:

petro@ikso.net

+421 902 203369

Por ke la faka vivo en Esperanto evoluu!

Peter Baláž, kunorganizanto



Ĉi en hospitalo Werner Pfennig havas *La Ondon*.

Dankon, Kubo! Dankon, Esperanto!

Post kvar-semajna restado en klinikoj en Santiago de Kubo mi feliĉe kaj sane revenis hejmen. Mia vojaĝo estis iom komplika kaj mi bezonis dum la tuta tempo medicinan protekton. Min trafis malsano, jam forgesita pli ol 60 jarojn, kies kaŭzo estis la forpelo kaj postmilita mizerogo.

Estis necesa vivgrava, tuja operacio, kiu senprokraste okazis.

En Kubo mi renkontis bone organizitan, altnivelan medicinan servon, kies kuracistoj kaj flegistoj posedas altan, ofte internacian, sperton. Al ili mi sincere dankas, ke ĉio bone finiĝis.

Pro mia nescio de la hispana lingvo mi bezonis ĉiutagan helpon de Esperanto-amikoj, kiuj dum siaj vizitoj zorgis pri la komunikado inter mi kaj la medicinaj fakuloj. Tie mi parolis nur Esperanton kaj povis per tio solvi bazan interkomprenon. Pro mia restado multaj dekoj da homoj eksciis pri Esperanto kaj kelkaj eĉ serioze interesiĝis. Mi ankaŭ povas substreki, ke la vere elkore praktikata medicina prizorgado havas grandan influon al la resaniĝo de pacientoj.

Kore mi dankas al ĉiuj, kiuj tiutempe salutis min aŭ nur informiĝis pri mia situacio, mia edzino ĉion peris per poŝtelefono al mi.

Werner Pfennig

3 jul 2010 forpasis

Umesao Tadao (1920–2010)

eminenta kultura antropologo, profesoro, aŭtoro de pluraj gravaj verkoj, iniciatinto kaj la unua direktoro de la Nacia Muzeo de Etnologio en Ōsaka. Esperantisto ekde la postmilitaj jaroj, li verkis kaj tradukis en Esperanto kaj informadis pri Esperanto inter japanaj sciencistoj; membro de la Honora Patrona Komitato de UEA ekde 1980.

9 aŭg 2010 en Saljan (Azerbajĝano) forpasis

Ŝaig Bahramoglu (1945–2010)

konata ankaŭ kiel Ŝaig Mamedov/Mammadov, ĵurnalisto, ĉefredaktoro de la rusa versio de la ĵurnalo *Azerbajĝano* (1992–1996) kaj de la revuo *Ganun* (La Leĝo, 1997–2006), la plej fama azerbajĝana esperantisto, redaktoro de *Sovetia Esperantisto* (1989–1990), fondinto kaj la sola prezidanto de la Azerbajĝana Esperanto-Asocio.

Ni funebras kaj kondolencas.



Ŝipo sur la Traka Maro

Originala novelo de Jozefo Kiss

Jozefo Kiss naskiĝis 7 mar 1942 en la sudhungarlanda urbo Békéscsaba. Instruisto de la slovaka kaj rusa lingvoj. Esperantistiĝis aŭtodidakte en 1957, en la 1960–70aj jaroj ofte partoprenis en la Somera Esperanto-Universitato en la urbo Gyula, instruis Esperanto en lernejoj. En la 1980aj jaroj kunlaboris kiel tradukanto en *Hungara Vivo*, poste ekverkis originale por *Debrecena Bulteno*. Nun Kiss vivas en la nordhungarlanda urbo Gyöngyös. Li jene skribas pri si mem:

“En relative egalanima stato mi pasigas nun miajn tagojn de emerito, servante la pasiojn, la hobiajn de ŝako, de legado de antikva (ĉefe greka-romia) literaturo, kolektante diverslandajn monerojn kaj poŝtmarkojn. Ankaŭ la naturon mi ŝatas, la montaran aeron — samtempe estas por mi refreŝige kaj kvietige observi la malgrandajn surterajn bestojn kaj la birdojn”.

Febra borealo ŝveligis la velojn: la direkto de la vento koincidis kun tiu de la veturo. La komerca ŝipo reveture al Ateno pasis per dormigaj ŝancelmovoj inter la obstinaj sed moderaj ondoj. Jen iu-tiu ondo kelkfoje alpremiĝis petole al la ŝipo, ke la naĝanta lignokonstruaĵo skuiĝu iom, tamen tiu ondoobstinaĵo rezultigis krome nur tion, ke Filotea sur la ferdeko eligis el sia buŝo afekte timiĝintan “ho, ho” voĉtorenton direkte al iu homfrata orelo laŭ sia espero. Ja da tiaj oreloj estis je la dispono unu-du en la proksimo; eĉ en tiun de Zenobios nevole penetris la voĉoformo — liaj ridetmuskoloj loziĝis iomete, tamen la rigardon li tenis senŝanĝe en la direkto de la foraj bordoj de Trakio.

La fantaziado, la cerbolaboro komencis flirti, vagadi simile al ripaj lignolamenoj de la ŝipo kaj kiel la almozantaj mevoj vage flirtis en la kaprica ventofluo; en la sama fojo la tikla ridado de la knabino preteririgis la menson de Zenobios disde la rememoroj de la renkonto kun la poeto, kaj la fakto, ke jenas la knabino, devige nomata ekde nun Filotea pro subita kaj arbitra decido de la ŝipestro, kiel li mem flustris intime: “je kongrua inspiro de liberaj ideoj kaj dinamikaj efektivigoj” — nu, tiu ĉi fakto lokis Zenobios denove en staton de konkreta realeco. Ĉi-maniere la estonta sorto de tiu ĉi sarmata knabino absorbis ree Zenobios, dum li observis la deklivojn de la kontinento kaj tiun faron la aŭtunaj sunradioj agrabligis plaĉe. Ĉu poste, kiel Ilarion promesis inter siaj planoj, li dungos Filotean kiel dancartistinon aŭ kiel instruantinon pri certa korpokulturo en iu gimnazio de Ateno? Ternatos kaj lia rondo de filozofoj certe atentis ŝin kaj trovos plezuron en la esceptaj atrakciaĵoj de la knabino — en la loĝio de aristokratoj eĉ la monuoj malfermiĝos pli larĝaj, se ekplaĉos la noveca korpopektaklo, la pantomimo. Sed povos okazi, ke tiu ĉi freŝkreska, ardanta estulino elglitos el la nefidinda gardo de la ŝipestro en iu malzorga momento, kaj realigantoj de malutilaj intencoj irigos la knabinon al kurbaj stratoj je nokta laboro ĉe la montopiedo Likabetos. En la imago, en la volbo de kunsenta animo de Zenobios tuj aperis la elverŝiĝa amaro de la knabina patro, se li ekscios, kiom la fato mizerigos la vivhumoron kaj honeston de Filotea en tiu ĉi lasta kazo; ja la patro destinas sian filinon al brila kariero en la majesta Ateno. Ankaŭ la patro Ĝurondibra estas honesta kaj li ligis kontentigan kontrakton kun Ilarion apud la bordo de Hister, kiam por Filotea la ŝipestro promesis liveri figon, sekigitan vinberon, olivon, bonkvalitan ŝtofon al ŝia patro, sekvajare Ĝurondibra

sendos post la filino rekompence ankoraŭ ŝamon, vulpopelton kontraŭ la frandaĵoj, ĉar la sarmataj arbaroj abundas je primaraj portantoj de tiaspeca pelto, krom tio la patro de Filotea estas eminenta ĉasisto.

En la ferdeka aperturo aperis la ŝipestro Ilarion, samtempe la ŝipposedanto — danke al la ĉielloĝantoj, aŭ prefere kiel favorato de la romia inspektisto en la haveno de Pireo. Malantaŭ li la lanugbarba Dimitrios venis flutante, kun kokfieraj saltetoj, gajigante sin jam nun al posta esperata amuzaĵo ferdeka.

Ilarion alpaŝis al Zenobios: iom da tempo ankaŭ li kontempladis la trakan pejzaĝon, profunde spirante la freŝan aeron.

— Eble morgaŭ ni atingos la insulon Lesbo, — li diris post nelonge. — Se la ventoblovo malfortiĝus, oni mallongigos la nenifaron de la servodeĵorantoj. Estas grava la stabila antaŭeniro.

Ilarion ŝatis uzi eŭfemismojn. Li nomis la akvoŝovelulojn, tio estas la galerulojn: vojaĝocertigantoj, ŝultrohavaj atlasoj, voluptemaj muskolkolosoj en sia lingvaĵo de floroj. Dekduo da tiuj katenitoj kunpremiĝis en la stomako de la ŝipo. Cetere lia ŝipo estis duremilvica, ĉe neceso oni povis ĝin utiligi ankaŭ por militaj taskoj — sed Ilarion tenis sin flanke de tiaspeca eventuala apliko kaj pli volonte navigaciis komercajn vojliniojn.

— Nu, ni rigardu, kion scipovas ĉi tiu knabino, — li puŝpikis la flankon de Zenobios, dronanta en siaj pensoj. — Korplezurige ludu la melodion al danco, Dimitrios, — li instigis la fluthavan bubon.

Jen grinco, jen krako de la ŝipoĉarpentaĵo puŝiĝis en la blovsonojn de la muzikilo eble pro tio, ke ili povu abundigi per ampleksa kaj kompakta tono la cetere malriĉan sonaron.

Eĉ Poseidon aprobe lasis, ke subite varma juktiklo diskuru en la vejnoj de la tri viroj esperantaj baldaŭ fariĝi atestantoj de supozeble gracia danco, miraklo kiu vekas sopiron, kaj atestantoj de brilo de amindaj virinaj korpopartoj, ĉar tra la maldika tolo de la kitone vestita Filotea erotike reliefiĝis la forto-plena brusto, la afroditece belaj nepasemaj mamomontetoj.

Ilarion turnis sin al la knabino, li gestadis al ŝi kaj stimulis ŝin por danci por prezenti la talenton. Ŝi malvolonte faris kvar-kvin dancopaŝojn kaj, ĉar la moviĝo en la donace ricevita kotorno estis nekutima, post minuto ŝi mishumora rigidiĝis en pozo de malseka kapreolo.

— Delasu la melismojn de Delos kaj la sonornamaĵojn, Dimitrios, ludu korĝojige, kvazaŭ vi irigus dinamikon en tendenon de langvoraj kapreoloj. Pensu pri la vekitaj sovaĝbestoj en la sarmata arbaro, — acerbe humoris Ilarion.

Dimitrios rememoris kompreneble ne pri la vekitaj sovaĝbestoj, sed pri la dornaj kaj pikantaj arbustoj, pro kiuj li ricevis multe da skrapvundoj, kiam Ĝurondibra invitis la societon al “arbara promenado”.

Filotea malbonhumore residis sur la trabon. Ŝi ne petis el la servitaj delikataĵoj: la ŝafofromaĝo kaj ruĝa vino. Kun taŭzita mieno ŝi rigardis la krestan maron.

— Nu, tio estas nur duonsukceso. Mi povus diri: Ohi epitihia. Ne sukceso, — resumis sian malplaĉon Ilarion. La fiasketo tamen lin ne tro malagordis: li trempadis kanditan oranĝoŝelon en ruĝan vinon kaj suĉadis ĝin.

Ankaŭ Zenobios faris rimarkon pri la viditaĵoj:

— La malkovrindaĵo kelkfoje antaŭenkuras de si mem, la rapidigo tiam ne alportas oportunon. Ĝi kaŭzas inhibicion. Imagu vin en la situacio de la knabino. Ŝi estas inter nekutimaj cirkonstancoj, en fremda loko, ĉirkaŭata de fremduloj, disigita disde la gepatroj, kaj ŝin atendas malcerta estonto, tute alia mondo... Traktu ŝin takte. Ni ne forgesu: ŝia patro konfidis ŝin al niaj ŝirmoflugiloj.

— Bone. Oni esperu, ke ŝia talento en Ateno disvolviĝos. Sole iom da scivolemo petolis kun mi.

Kvazaŭ iluminiĝo devenanta de Zeuso estus metinta aŭreolon de paco sur la du nejunajn grekojn, tiel kontente ili aŭskultis la muzikon de la patrujo fare de Dimitrios, kiu daŭre persistis kaj fervoris en la sorĉo por povi ekmovi la langvoran knabinon.

La ŝipestro milde puŝpikis sian kunulon.

— Zenobios, vi ankoraŭ apenaŭ rakontis pri via renkonto kun Publius. Mi deziras aŭdi pri tio, ja tamen tio povis esti granda okazo. Kiel li pasigas la ĉiutagojn?

Jam de tagoj oni povis atendi ĉi tiun neformeteban demandon. Nature, ke la scivolemulo interesiĝas pri la vivo de la poeto.

Minutoj pasis, ĝis fine la malnova amiko de la ekzilita poeto elvokis kaj vortigis la rememorojn pri la amar-dolĉa renkontiĝo — la drinkaĵo de Dionizo havis en tio nemalmultan rolon.

— Mi jam menciis, — komencis Zenobios detali kaj dividi sian travivaĵon, — kun kiom da ĝojo mi brakumis mian malnovan amikon romian post multegaj jaroj. Ankaŭ tion mi diris, ke la magistrato de la loka greka kolonio zorgas pri lia provizado, eĉ meĉo estas asignata por li po dek tagoj, ĉar en lia ĉambro regas duonlumo, la vezikomembrano kovranta la muraperturon enlasas internen nur moderan helon. Sur lia kuŝejo ŝvelis bonodora fojno en tolsako, kiun geta virino ŝanĝas de tempo al tempo, sed vintre ne. Dum la unua tago de mia vizito Publius min regalas per flano plenigita per kazeo; ni ekkuŝis laŭ la romia moro, kiam neatendite aperis iu juna geta knabino en la pordo, kiu alportis rostitajn fiŝetojn kiel kompletigaĵon. Je tio ni komencis joviali, ĉar mi kredis aktuala kaj trafa iun malnovan ĉikanon: “Ĉu vi estas tiu, Publius, kiu kaptas la fiŝon el la maro, kaj se jes, ĉu vi staras nuda en la akvo same kiel Pan staras en ĝi purigante sin, ĉu ĝistalie aŭ ĝiskokse, por ke la sala akvo ellavu la salon el la sulkoj de via subkorpo, sekve de kio utilo kaj puriga ĝuo kunfandiĝas, do ekonomio kaj higieno, kiuj pariĝas tiel ĉi feliĉe, kaj ĉu mi

diru, kiun vian korporganon la ezokoj opinias logaĵo, poste frandaĵo por si mem?” — sed en tiu minuto la juna knabino jam ne ĉeestis en la ĉambro. “Jen malaperas el hejmo, ŝi de ŝercoj fuĝas evite”, — murmuris la gastiganto la heksametron improvizitan, samtempe finante la acerban ironion de la momento, ĉar kiel mi vidis la malriĉan, mi povus diri mizeran instalaĵon, la certeco preterportiĝis, ĉu oni ekhavas ankoraŭ humoron je plua primoko. Li glatigis sian maldensan hararon blankiĝintan kaj malrapide, kun stoika apetito maĉis la frititan fiŝon. “Vi vidas, la cirkonstancoj faras min apatia. Amnestio ne venas, kvankam mi jam nudigis min sentrilate en miaj epistoloj senditaj en Romon”. Mi rimarkis ruĝajn makuletojn sur lia kruro, kiam li suprentiris la vestoteksaĵon. Ĉu ili estis piko de kulo aŭ iksodo? Ĉu mi frontos ankoraŭ kromajn signojn de lia kadukeco? “Terure granda doloro estas al vi kaj al ni, kiuj konas vin, — diris mi konsterniĝante pli kaj pli kaj spertante la disvolviĝantajn dimensiojn de lia mizero, — ke vi devas vivaĉi en tiu ĉi malafabla regiono, nekredeble malproksime de via adorata Romo kaj de via familio. Prefere mi kunportus vin en Atenon”. “Kontraŭleĝe mi ne rajtas vivi aliloke”, — li diris. “Kaŝate vi daŭre esperas la retiron de la imperiestra edikto, la repaciĝon de la reganto. Mi opinias, ke post via *Ars amatoria* vi estus devinta ne plu verki. Ja vi mem skribis ie en la rulaĵo: ‘Se mi havus cerbon saĝan, mi ekmalamus rajte la verkadon’. Se per viaj pli postaj verkoj vi ne estus fervorinta konstante antaŭ la okuloj de la cezaro, eĉ se tiuj verkoj demonstrus tiel nomatan rekonsciiĝon, vian lojalecon, la homa malzorgemo post iom da tempo sen tio venigus la juste-maljuste koleranton en agrable indiferentan staton de forgeso. Nature ĉi tiel nur mi, la simpla ‘daskalos’ scipovas rezonadi, formante la situacion je malkomplika figuro, ĉar vi vidas, mia stulto malhelpas la rekonon de tio, ke fakte la poeta ambicio ne allasas modestecon, aŭ almenaŭ ĝi ne rigardas tion aprobe kaj ĝi trovas kariero abortita, se iu kontentiĝas pri la titolo de unulibra poeto. Unulibra poeto ja kun ŝanco de forgesiĝo, sed samtempe kun certeco de seninsulto. Ĉu decas daŭre vigli antaŭ la imperiestro, vekti en li kondiĉitan reflekson, senĉese memorigi lin pri la al li ne plaĉaj eksceso en via *Ars amatoria* — ecce videsne?” — Je miaj senbridigitaj frazoj impulsiĝemaj Publius demandis min surprizite: “De kie vi scias pri miaj epistoloj senditaj en Romon? — kaj poste li aldonis en ĉagrenita tono: — Mi konfesas eĉ hodiaŭ: eĉ eron da malpermesitaj doktrinoj mi ne instruis en miaj am-versaĵoj kaj oni senkaŭze serĉadis en ili la ofendon de leĝoj, ĉar mi ĉiam estis singardema por fari ion kontraŭ la nobla virto. Cezaro opiniis malkaŝi dekadencan en mi kaj pro tio portas mi la nunan sorton. Aliparte komponi distikojn kaj heksametrojn signifis por mi instinktan donitaĵon, oni povas diri: devigon. Kial do mi estus devinta ilin sufoki en mi? Foje mi menciis al vi, ke en mia infanaĝo de portado de purpurbordera togo mi kalkanum-frapetis la daktilojn kaj spondojn sur la pavimo de nia domo en Sulmo, dume mi skandis poemon de iu elstara poeto-antaŭlo. Tamen eblas, ke vi havas pravon. Kial do ordonas la ĉielloĝantoj, ke la mortemulo ree frontu siajn erarojn krepuske de la vivo kaj li ne kapablu eviti ilin kaj ke ili deprimu lin tagon post tago, ke la mortemulo sopiru al Orkuso senĉese, penante pri porto de korpa kripliĝo?” Amaro eruptis el li; doloron li sentis en la spino kaj ĝemetis, kiam li etendis la manon supren al la rustike rabotita breto por juglando, kiun li proponis al mi. “Mi mem plantis ĉi tie juglandarbojn. Tuj ĉe la enirejo komenciĝas la peristilo”. “Kaj ĉu la



En la novelo de Jozefo Kiss *Ŝipo sur la Traka Maro* oni rekonas la figuron de Ovidio (Publius Ovidius Naso), kiu en la 8a jaro p.K. pro sia *Ars amatoria* (Scienco de amo) estis ekzilita de Aŭgusto Cezaro al la nigramara urbo Tomo en la lando de getoj kaj sarmatoj. Nun tie troviĝas la rumana urbo Constanța, en kiu Ovidio estas monumente eternigita.

juglandarboj konsistigas la kolonojn al ĝi?” — spitis mi krude, ja ĉe mia alveno en tiu ĉi “peristilo” mi vidis nur ligustrojn kaj buksoarbustojn krom juglandarboj; sub ili nigra kato siestis. “Kaj se vi pluiras, — li daŭrigis, malatentante mian interdiron, — vi trovas locus sordidus, alinome latrinon en vulgara lingvo. Se la urinveziko streĉiĝas”. Sed ĝi ankoraŭ ne streĉiĝis. En la angulo mi rimarkis liuton. “Produkto de programana lerto, — fanfaronis Publius konjektante mian interesiĝon. — Mi sonigas ĝin eĉ plurfoje tage je mia distro: dum la pinĉado mi aŭdas la muzikon de sirenoj pasiovekaj tiel, ke mi sentas min hejme, en Latium aŭ en Campania. Okazas, ke mi iras al la maro, tie mi muzikas sola, mi envolvas min per milda narkotiteco, per miksaĵo de sonoj kaj sopiroj, antaŭ miaj okuloj ree aperas la fea pejzaĝo de Neapolis, eĉ pli la adorata Romo kaj mia familio. Ankaŭ Jupitero helpas min en la revado, ĉar post tio nokte en la sonĝoj miaj karuloj min karesas kaj anoncas al mi favorajn novaĵojn pri pliboniĝo de mia sorto”. “Nu, mi povas imagi la amaron de vekigi”, — aldonis mi komplete kaj kunsente. KREDU al mi, Ilarion, mi estis senpova diri ion ajn post tio, ne restis forto en mi por konsoli lin, tiom paralizis min la malĝojega vivo de mia amiko kaj tiu vekigiinta agnosko, ke jam tute ne reviviĝos espero je lia rehejmiĝo, kaj lia malinda konsumiĝo estas neevitebla ĉi tie en la ekstera rando de la vivebla mondo. La muraperturon tiam Phoebus komencis jam orumi adiaŭe per siaj radioj, kiam la nigra kato enpromenis en la ĉambron. Ĝi frotis sin al la mastro, al la vundohava kruro, kaj ĝi memrespekte atendigis sian tutan flatan estaĵon je tiu minuto, kiam ĝi povos ricevi sian parton en karesado, en dorlotado, absolute preskribitaj al ĝi. Danke al favoro de la momento mi fariĝis atestanto de emocia kunaparteno de du orfaj estuloj, atestanto de intima simbiozo de antropos kaj zoon. “Ĉu estas permesate desegni vin ambaŭ ĉi tiel?” — mi demandis, montrante iom da entuziasmo. Li hezitis, sed lasis la aferon al mi. “Faru, se la eternigon vi trovas bona por la posteularo. Sur la breto vi trovas rulon, sur kiu sin proponas malplena spaco ĝuste por bilda figurado pri dando estiĝinta katoamika”, — ironiis li. Tamen li gardis la stoikan, ne tro pasian humorstaton: “Bonvolu depreni tiun papiruson, sur kiun mi skribis titole: *Tiberius triumphans*”. Ĝis krepuskiĝo la desegno estis preta. La sekvan matenon Publius lignon hakadis en la peristilo ĉe mia alveno. “De tago al tago estas granda peno zorgi pri mi. Herkulaj taskoj”, — li diris dum li videble elĉerpiĝis. Ni eksidis sur longan lignotabulon. Mi meditis ioman tempon, fine mi ekmemoris la Naŭan libron. Ĉar li jam menciis la nomon de la simpatia filo de Alkmene, ankaŭ mi faros iun alian historieton

temo de parolo kaj paraleligos ĝin kun la antaŭa, pere de kiu supozeble mi diros al li novaĵon, sed provizore la tagiĝa postrosa lumbrilo lanĉis la nimbon de nia nacia heroo al pormomenta pritrakto. “Apoteozo de Heraklo, — li murmuretis antaŭ si. — Ĉu staras ankoraŭ tiu statuo sur la agoro?” — demandis li kun revo kaj li ĵetis la rigardon longe suden. “Jes, ĝi staras, — mi diris al li. — Centurioj kaj censistoj ĝin admiras same kiel ankaŭ ni admiris antaŭ jaroj. Nu, en iu el viaj verkoj, en *Metamorfozoj* la ĉielloĝantoj levis Herkulon inter sin post lia torturmorto. Antaŭ nelonge ja mi informiĝis pri aŭgurado de la haruspekso en Boiotio, laŭ kiu dekkvinjara mirinfano el Judeo leviĝos ĉielen plenkreskul-aĝe al sia dia patro, same post torturmorto. Pri tio vi certe ne scias”. “Danke al vi pro la novaĵoj, mia bona amiko Zenobios. Metu en vian menson ĉi tiun saĝon nematuran kiel respondon, kiun mi improvizas en distiko cele de konsidero jene: ‘Sorto vin estras al tasko reala, sed montri la venkon Nur la plej bonaj kapablas inter ĉieluloj’”. Ĉu vi jam perceptas, Ilarion, ke tiu spiritfajrera eldiraĵo havas tiom konvinkan forton al la kredigo de lia altranga intelekta noblaĵo kaj ercofrapaĵo. Li ankoraŭ sciopovas freŝe prezenti siajn vortoformaĵojn kaj atikecon, kvankam la imperiestra deklaro — metafore dirante — fendis lian vivon. Cetere tiu deklaro, alinome relegacio, signifis por li iaspecan konsolon, kiel li rakontis al mi, antaŭ ĉio el la vidpunkto de lia familio kaj de alireblo de liaj verkoj, ĝuste pro tio li tute ne uzis la apelacion tiel nomatan ius provocationis kaj li ne deziris turni sin al la senato, krom tio li estimis obeemon kaj malignoris la ordonon de la princeps, ĉar li rigardis la observon de la romia virto trankvila kaj samtempe promesa apelacio al la revizio de la rigora procedo, se la afero tiel doniĝos. La juĝo efektiviĝu ad personam, al poeto en poezia poluro, se ĝi aŭdeblas en pimpa formo de aliteracio, des pli bone: Recipe relegationem! Mi diris al Publius: “Fakte Octavianus per sia longdaŭra meditado lasis al vi tempon, jarojn, ĝis li alvenis al la kruela decido, ke vi povu fini la *Metamorfozojn* kaj povu komenci la pompan kalendaron, la *Fasti*. Pri tiu cezara hezito vi donas mension en la verkaro *Tristia*. Ke mi transformu la formulon cinika: li certigis por vi longajn poezikreajn jarojn en la prokrasto. — La lastan frazon mi pripentis iomete sed mi daŭrigis. — Responde je via hieraŭa demando mi diras, ke la kopiojn pri viaj kreitaĵoj akiras Kostas, mia disĉiplo en Quirinalis por tintaj sestercoj. Li estas tiom bone edukita, ke li transsendas ilin al mi en Atenon fare de siaj konfidenculoj. Vere viaj epistoloj agitas min plej multe. Ili estas plenemociaj, korbataj. Pro la malĝojo ili havas aŭtenton; ilia efiko ne paliĝas. La ordono de fato, ke la sankta seriozeco ĝuste ĉi tie devis konvertiĝi al vi. Bedaŭrinde konate, je kia prezo”. Mi eksilentis, ĉar mi vidis sulkiĝon sur lia vizaĝo. Per tio, ke por mallonga tempo ni prenis decidon je senvorteco en la fruaŭtuna tepido, ne malutilis al ni, kaj en la silento nur grekaj, getaj parolŝiraĵoj aliris nin sporade el la foraj ŝirmomuroj, trans kiuj oni konjektis malplaĉan agadon de armitaj barbaroj rajdantaj. En gracio pompantaj hirundoj kaj aliaj birdoj entuziasmis en la aero, ili arkfarris sian flugon tien-reen, antaŭ ni la nigra kato ridetige membrostreĉis, sole el Publius elŝprucis la vuala voĉo de malĝojo kaj neforpuŝebla apatio: “Jam de ok jaroj... Jam ne tre mi deziras dekdufoje spekti la plenan arĝentoplaton de luno surĉiele en sensonĝaj noktoj... falis jam la baraktint’ pezturmentita turpe. Aŭdu ĝin eĉ sen heksametro: ‘Pauper ubique iacet’”. La fajra disko de la ĉielo, la brulĉaro de Phoebus altiĝis super ni. Ie aŭdiĝis febraj gongoj,

kaj survoje ekaperis la geta knabino enmane korbon tenanta. Ŝi venis kun bongustaj viando kaj pasteĉo: la magistrato sin distingis per la regalo kaj afablumis je la honoro de la greka gasto. Ni manĝis trioĉe, ĉar ankaŭ la nigra kato aliĝis al ni. Mi raportis pri mia familio, pri la ĝenerala situacio en Ateno kaj la eltenebla superregado de romianoj. Mi promesis al li, ke la desegnon mi venigos al lia edzino kaj mi donos novaĵon al li pri ŝi kaj lia filino Perilla. Li tenere ĉirkaŭbrakumis min, kvazaŭ tiu ago povus kuniri kun la desegno al lia edzino en Romo. Li ĝojis pri ĉiuj miaj vortoj kaj admiris min, pro tio ke mi ankoraŭ kapablas plekti planojn en mia aĝo de sesdek jaroj, en kiu aĝo li ankaŭ estas. Mi ekvidis larmoguton en liaj okuloj. Ja, nia lasta renkontiĝo tutverŝajne. Mi premis lian magran korpon al mi kaj esperigis lin aludante pri la neelĉerpeblo de animo: li verku plu sen perdi la memfidon, aktivadu en la peristilo, alproprigu la lingvon de la geta knabino kaj babiladu kun ŝi, instruu ŝin. “Eble okazos, ke dankemaj, fieraj posteuloj starigos monumenton je via memoro ĉi tie antaŭ la domo”, — nutris mi dube la langvoran kredon. Mi ekiris al la haveno sur la polva vojo kaj retrorigardante mi vidis: Publius staras senmove, sekvas min per rigardo, jen li levas la okulojn super mi al malproksimo, li estiĝis tuj statuo, transformiĝis, per transsubstancia adaptiĝo li fariĝis kvazaŭ strikta rolulo de la *Metamorfozoj*; tiu mistika posttagmezo plene lin sorĉis tia, plimultigante per sunradia ardo. Jes, li staris rigide, same kiel lia kara kato ĉe la piedoj, kaj mi kvazaŭ estus aŭdanta, ke li diras: “Vale in aeternum”, sed verŝajne nur halucino petolis al mi kaprice, ĉar malmulto mankis ke mi rekuru al li por kunresti kun li ĝismorte aŭ por kapti lin kaj kunporti en Atenon eĉ neglektante la leĝojn.

Finante la raporton, Zenobios tute ekscitiĝis kaj per refleksa mienfaldo de amaro li atestis la realecon de la elvokita travivaĵo kaj ĝian efikon al li. Peza sento direktis la meditado de li kaj de Ilarion al ununura sombra tereno, al tiu de malgajiĝo kaŭzita de senpovo: al tio, ke paralele kun la pereado de tiu ĉi romia poeto finiĝos la brilega ora epoko literatura en la plej perfekta, plej impona imperio.

Ilarion ĉagreniĝe balancis la kapon kaj riproĉis sin pro tio, ke li tro longe ĝuadis la gastamon de Ĝurondibra, poste la negocajn traktadojn kunigitajn kun ekzotika ekskurso, unuvorte la bradipecan senruliĝemon de la tuta sarmata kutimaro kaj regularo diplomatia, sekve de kio li perdis la ŝancon renkonti la poeton-grandulon almenaŭ dum unu horo, eĉ kiel maljunan, kadukan, ekzilitan. La amara sento kvazaŭ translokiĝis en lin de lia ŝipkunulo post la aŭskulto de travivaĵoj, tamen li apenaŭ tekstigis ian kromdiraĵon, demandon sur liaj lipoj, kion Zenobios atribuis al tio, ke la ŝipestro kiel tolerema akceptanto de la longa rakonto denove prifunkciigas en si la elvokitajn bildojn, la detalojn, kaj tio estas ja interna laboro, neglektanta superfluan parolon. Laŭdajn vortojn Ilarion tamen diris pri la desegno, sur kiu la kato igis lin eĉ rideti iom. Li turnadis, legetis la rulaĵon titolitan *Tiberius triumphans*, kaj ĉar li priantis konstruadon de turo sur la proksima bordo, li metis la rulaĵon surbenken kaj iris al la kontraŭflanka barilo. Li vokis tien ankaŭ Zenobios.

— Tutcerte lumturo estas konstruata tie, — li diris.

Tiu ĉi konstruaĵo elpaŝanta el monotoneco de la marvojaĝo vekis nature ankaŭ la interesiĝon de Filotea kaj Dimitrios, kvankam ili jam komencis ian zumkantan-kantikan duet-ludon kun obtuza melodio. Intime, kun incito de amikiĝemaj okuloj unu por la alia kaj en glora konkordo.

Ilarion puŝis la ripon de sia olda vojaĝanto. Li montris al Filotea kun komplika rideto kaj rimarkigis:

— Ĉi knabino estis antaŭe simila al laca kariatido. Kaj nun... Kvazaŭ oni estus depreninta ŝarĝon de ŝia kapo... aŭ de ŝiaj piedoj.

Ĉar ja Dimitrios ĝuste tiam komencis malligi la rubandon de la kotorno kaj liberigi ŝiajn piedojn; kompreneble dume la mano kaj la maleolo kunfrotiĝis, kompreneble post tio elgargariĝis la milde voluptemaj sonoj “hu, hu” tra la gorĝo de la knabino.

En tiu ĉi momento iom forta ventoblovo ŝiriĝis el la borealo, ĝi kaptis kaj traĵetis la rulaĵon lasitan je sia sorto tra maldensaj stangetoj de la barilo kaj batfaligis al la luktantaj ondoj. La rulaĵo ankoraŭ iom baraktis kontraŭ la elementoj sed baldaŭ kapitulacis al la marabismo.

Pro ĉi tiu novelo Jozefo Kiss iĝis laŭreato de la literatura konkurso *Liro-2009* en la branĉo *Originala prozo*.

La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso Liro-2010. Ĉi-jare estas proponitaj du originalaj kaj tri tradukaj branĉoj:



1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduko el la angla lingvo: *The man who lived for others* de Jerome K. Jerome
4. Traduko el la franca lingvo: *L'ami Joseph* de Guy de Maupassant.
5. Traduko el la rusa lingvo: *Amerikanec* de Arkadij Averĉenko.

En la originalaj branĉoj (1, 2) oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj, en la tradukaj branĉoj (3, 4, 5) — nur per unu verko.

La originaloj de la tradukendaj tekstoj estas elŝuteblaj en la retejo de *La Ondo de Esperanto*: <http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-liro.htm>

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1a de decembro 2010.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso <sezonoj@yahoo.com>. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizanto ĝis la 1a de januaro 2013 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Bonŝancon!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro*

La litomiŝla tombejo

Karolo Piĉ. *La litomiŝla tombejo*: Romano. Saarbrücken: Iltis 1981. 276 p.; 2a, kor. eld. Saarbrücken: Iltis 1989. 276 p.


Oni konas la rezervojn de la granda Kalocsay kontraŭ *Ŝtupoj sen nomo*, la unua poemaro de Ragnarsson. Kaj tamen ĝi aperis dank al la avangarda vizio de Juan Régulo. Tio estis en 1959.

Preskaŭ 20 jarojn poste, en somero 1978, la sama Régulo popaŝadis en la Lucerna kongresejo: kuspis lin ne nur la ĵusa fotorepreso de *Libro de amo*, verko anonime kaj pseŭdonime eldonita en 1965, sed lia-teke troviĝis verko de alia aŭtoro kiu kaŭzos pli da kirloj ol la islanda poeto: li legis al kelkaj amikoj (i.a. Roger Bernard kaj Gaston Waringhien) la manuskripton de *La litomiŝla tombejo* de Karolo Piĉ. La ĉeĥo ĝis tiam ne elpaŝis kun propra volumo. La amikoj de la kanariano nete kaj definitive malkonsilis la eldonon kvazaŭ temus pri sakrilegio kaj delikto. Kiam, tuj post la kongreso, Régulo vizitis min en Sarlando, ankaŭ mi legis kaj fasciniĝis tia-grade, ke mi ne nur komencis densan korespondon kun Karolo, sed faris ĉion por eldoni la verkon. En printempo 1981 min vizitis William Auld kaj li kunfestis la aperon de la romano. Sian opinion, baldaŭ poste, li deponis en la revuo *Fonto* (13/1981).

Kiel Régulo, ankaŭ Auld previdis du reagajn antagonismojn: la entuziasman kaj la disdegnan. Ambaŭ tamen supraĵas: necesas kompreni, ke ĉe Piĉ ĉio simbiozas kaj ke tion ne povas perturbi la preĵuĝoj de legantoj. Ilin, pensis Auld, povus agaci du faktoroj: la “eksplicitaj amorpriskriboj” kaj la lingvaĵo. Sed li rekonas: “La valoro de la Piĉaj eksperimentoj troviĝas antaŭ ĉio en la fakto, ke li nenion proponas teorie kaj kabinete, sed li liveras por ĉio kuntekstojn praktikajn...”

Kion la pagano Auld ne komprenis estas la analogio inter la kibernetika karaktero de Esperanto kun ties ĉiam egalaj leĝoj de la vort-farado, la eterne validaj liturgiaj ritoj de la kulto katolika kaj eĉ la samaj ripetiĝoj de fikoj kaj fornikoj — ĉio *sub specie aeternitatis*... Ĉio samas, ĉio kunfandiĝas, ĉio formas trinitatan unuecon... Jen kion Piĉ instinkte perceptis kaj ĉi magion de la vivo li re kaj re prezentis, natur-leĝe kaj kun kosma validiĝo, ab sun-leviĝo ĝis suno-sinko, paske kaj krist-naske...

Ankaŭ Fernando de Diego (*Dialogo* 1/1982) metis la verkon sur sian



pesil-tason antaŭvidante ke en la proceso de asimilo kaj elimino la bilanco prezentos favoran saldon. La hispano deziras, ke “oni legu kun serioza atento” la apendicon de la verko kaj rekonas: “Ankaŭ la kuraĝo de Piĉ laŭdindas. Ne nur lia intelekta kuraĝo ‘revolucie’ stimuli kontraŭ la establitaĵoj, sed ankaŭ lia kuraĝo morala spiti, per vera denuncio, la sufokan arbitron de la Grandaj Silentigantoj”.

Klaran distingon de la spiritoj faras ankaŭ Osmo Buller (en la fest-libro Régulo, vol. IV): “Preterpase ni rimarku, ke neni el tiuj, kiuj ŝtonumis la lingvon de *La litomiŝla tombejo*, dediĉis linion al ĝi kiel literatura verko, nek al ĝiaj enhavo kaj idearo, kies prijuĝon emas forgesi ankaŭ la ekzaltitoj de la lingvo”. Kaj li daŭrigas: “Kiu tamen venkas siajn antaŭjuĝojn kaj kuraĝe eklegas, premie ĝuas stilon, poezie belan, kiu ĉiam pulsas samtakte kun la enhavo kaj ofte atingas tian virtuozecon, ke sole tio pravigas la penon”.

Régulo mem neniam akceptis la prudon de siaj lingve frid-pisaj malkonsilintoj kaj frue rompjis lancon por la verko. Sian fervoron li montris en recenzo sur la paĝoj de la UEA-revuo (4/1982), kies esencaj partoj ĉi-sekvaj plu validas.

«Temas pri romano, sed pri kronika romano, verkita kun seriozhumura tenoro. Nam, en tiu ĉi romano, la fabulado estas la absoluta protagonisto. Forma, movada, lingva fabulado. Temas do pri rakonto vortume bunta, riĉa, fojfoje eĉ tro riĉa, ĉiam enhave kaj lingve obseda. La fabulo — lingva kaj rakonta fabulo — voras per siaj lingvointrigo kaj rakontointerplekto tiujn, kiuj tra ĝi aventuras. Tiu rakonta *Vi* de la tuta romano legologas serĉe de la fabula vero.

La unua fabula vero estas tiu pri la

lingvo. [...] Li pravas, ke Esperanto estas samtempe kaj lingvo kaj teĥnika invento. [...]

Kia lingvistike noble dislumanta gemo estas la Piĉa postĉapitro “La romano kaj ĝiaj lingvaj problemoj”! En ĝi Piĉ montras, ke Esperanto estas jen eĉ artefarita, jen eĉ evolua lingvo, kaj, krome, kiel ĝi jam kombine superas kaj laŭ povos superi la dialektikan fundamentan veraĵon, kiun ĝi prezentas, nome: artefaritan kaj vivantan interkompreniĝosistemon. [...]

Enhave, Piĉ konstruas laŭ sia memoro. Liaj paĝoj estas rememorado. Lia memoro agas kiel filtrilo tra lia nuna mondkompreno. La libro estas komponita ekde meĥanismoj retrospektivaj de la nuna situacio. Sed ĝi ne estas agromezurista registrado; ĝi estas beletra kreaĵo, en kiu intervenas la imago transformanta la eton en egon, la egon en eton. Sed samtempe la libro estas farita kun lojalo kaj digno. Tre humane. Certe ĝi, tiel, entuziasmigis, mirigos multajn; sed, samtempe, forte iritos aliajn.

La rakonto modliĝas ĉirkaŭ koncentraj cirkloj neelĉerpeblaj, ĉiam revenantaj. Piĉ, ame kaj endogamie, edziĝis al Litomiŝlo, al Esperanto kaj al Femino. Al tiu triopo li, dediĉe-karese, fordonas la plej sunbanitan lokon de sia koro. [...] La teksto de Piĉ estas riĉega kaj konfuza; ankaŭ ĝiaj kolateralaj, fratparencaj, ekstertemaj ekskursoj agas tiudirekten: la vualoj ŝajne faladas antaŭ ni, sed ili neniam parfalas. La intermitaj rakont-niveletoj signas vojon; kaj ĉiu nivelo havas sian propran lingvaĵon, ĉiam tre zorge prilaboritan, same leksikone kaj sintakse, kiel, ĉefe, ĉefege, ritme kaj stilistike. Ĉio kunfluas. La rolantoj sin diluas en la fizikan kaj magian spacon, kiu ilin volvas. Tra la tuta fabulado la spertosaga scio de la aŭtoro transigas la rolantojn en figurojn de beletra friso, kie ili fariĝas belliterature eternaj. Piĉ forĝis la unuan prozan epopeon de nia lingvo internacia».

Fine de sia recenzo Régulo donis jenan konfeson: “Por mi ĝi randas eĉ erotikan ĝuon!” Kaj: “Mi estas ĝisekzalte entuziasmigita de tiu Piĉalo”.

Pri unu detalo li tamen misprognozis: “Tiu libro, eĉ se ĝi iom post iom elvendiĝos, probable ne tuj ekfuroros inter la ordinara esperantista amaso”. Aperis ne nur dua eldono, sed ankaŭ novaj verkoj de Piĉ kaj eĉ *Literatura Foiro* ĝin deklaris Verko de la Jaro 1981. Li fariĝis klasikulo. Deko da verkoj liaj restas eldonota.

Kial nur Humphrey Tonkin hontas pri Piĉ?

Reinhard Haupenthal

La 32a MIKF: Politiko abundis, gajnis Frato

Revuo de Grigorij Arosev

La konkursa parto de la 32a moskva internacia kinofestivalo (MIKF), tradicie okazinta en junio, estis plenigita de filmoj, kiujn oni povas konvencie nomi “politikaj”. Konsiderante, ke plejparto de tiuj filmoj estis faritaj en eksksocialismaj landoj kaj estis dediĉitaj al ĝuste tiu epoko, tio ne povas esti hazardo, sed konscia elekto de programa direktoro de MIKF Kirill Razlogov (fama fakulo pri kino, gvidanta sian propran televidan programon *Kult' kino*). Razlogov kaj aliaj festivalestroj sendube konscias, ke “politika nostalgio” estas nun bezonata kaj aktuala, kaj spektantoj volas denove mergiĝi en la pasintecon, por pere de kino kompreni, kio estis bona tiam, kio estis malbona. Samtempe tiaj filmoj estas averto por la nunaj moŝtuloj — ege gravas ne ripeti antaŭajn erarojn (tia risiko, bedaŭrinde, nun reaparis).

Germanio prezentiĝis per la filmo *Boxhagener platz* (en la rusa traduko komence estis aldonita vorto “Berlin”, dank’ al kio rezultigis klara aludo al la majstroverko de R.W.Fassbinder *Berlin, Alexanderplatz*, sed la simileco estas nur en la titoloj — feliĉe). Ne temas pri aparte elstara filmo — estas multaj politikaj konversacioj kun sufiĉe ordinara temlinio, bazita sur esplorata krimo. La filmon “savas” aktorino Gudrun Ritter, kiu rolas virinon, malgraŭ sia aĝo daŭre sentantan bezonon esti amata kaj amanta, pro kio ŝi edziniĝas ses- aŭ sep-foje. Samtempe la karaktero prezentata de Ritter ne estas komika aŭ farsa — ne facila tasko!

Malsimila laŭ etoso, sed simila laŭ ĝenerala humoro estas la filmo de la klasikulino de la hungaria reĝisoro arto Márta Mészáros. Ŝi portis al Moskvo la filmon *Utolsó jelentés Annáról* (La lasta denunco pri Anna), bazitan sur reala historio de Anna Kéthly — hungara politikistino el la registaro de Imre Nagy (1956). Laŭ la filmo, literatura kritikisto Peter estas sendita al Londono, kie loĝas Anna, por konvinki ŝin reveni en Budapeŝton. En *La lasta denunco* temas ne nur pri politiko, ĉeestas ankaŭ lirika linioj, interalie, ligitaj rekte kun Kéthly, tamen la kerno estas intelekta debato, logika duelo inter Anna kaj Peter, ambaŭ prezentantaj tute malsamajn vivkonceptojn kaj vidpunktojn.

Malpli politika enhave, sed rakontanta pri la malnova tempo estas la bulgaria *Stŭpki v pyasŭka* (Spuroj sur sablo). Unu el plej simplaj, sed samtempe kortuŝaj filmoj — junulo Slavi malreciproke amis belan Nelli, kaj decidis fuĝi el Bulgario en Okcidentan Eŭropon. Post 20 jaroj li revenas, rakontas sian historion al hazardaj homoj kaj provas trovi sian amon.

Kvankam kaj Gudrun Ritter, kaj Enikő Eszenyi (Anna Kéthly) altnivele plenumis siajn partojn, la premion por la plej bona virina rolo ricevis Vilma Cibulková (*Zemský ráj to na pohled — Surtera paradizo*, Ĉeĥio). Ne estas mirinde, ke ĉeĥa filmo milan fojon rakontas pri la eventoj de 1968, sed samtempe ĝi metas akcenton egale sur personajn kaj sociajn aferojn. Kroma plusego de la filmo estas absoluta manko de negativaj protagonistoj, kaj aparte amuzas la spektantojn kreiĝinta ama — ne, ne triangulo! — minimume dekanĝulo, kiun lerte gvidas la ĉarma Marta, plenumata de Cibulková.

La premion por la vira rolo gajnis albana aktoro Nik Xhelilaj, kiu estas ĉefprotagonisto Arben en *La albano*. Arben volas edziĝi, sed por “elaĉeti” sian fianĉinon li bezonas grandan sumon, do li kontraŭleĝe veturas en Germanion, kie li provas ĉian laboron. Diference de la aliaj, ĝi prezentas aktualaĵajn problemojn de moderna socio, sed estas absolute klare, ke situacio, kiun trafis Arben, ne estas hazarda — ĝin kaŭzis la multjara mispolitiko de Albanio (same kiel de pluraj aliaj landoj). *La albano* havas tre malklaran kaj malfiertan finalon, sed tio estas riproĉo al la reĝisoro, sed ne al la aktoroj, kiuj bone faris sian laboron.

Fortegan filmon prezentis la pola reĝisoro Jan Kidawa-Błoński — *Różyczka* (Rozeto). Ĝi meritas apartan studon (kiun ĝi ricevos — se ne jam ricevas) en Pollando, sed nun ni koncize menciui, ke *Rozeto* estas inspirita de la vivo de la verkisto Paweł Jasionica (lia filino oficiale avertis gazetaron, ke se oni ligos la nomon de Jasionica kun ĉi tiu filmo, oni ricevos juĝprocezon). Eventoj okazas en 1967. La neĵuna verkisto, en la filmo nomata Adam Warzewski, edziĝas kun la bela junulino

Kamila, kiu evidentiĝas agentino de la pollanda sekurservo. Iom post iom ŝi decidas ne plu spioni kontraŭ Warzewski, sed “la granda frato” ne lasas ŝin libere vivi, kio kondukas al granda privata katastrofo — komplete ruiniĝas la vivoj de minimume tri homoj. *Rozeto* estas filmita sur altega nivelo, ĉio estas preskaŭ senriproĉa. Ne ĉiujn agojn de la protagonistoj oni akceptas, sed tio ne estis celo. Homoj en ĉi tiu filmo estas pentritaj ĝuste tiaj, kiaj ili estas — kontraŭdiraj, naturaj, farantaj bonon kaj malbonon. Pro tio la decido de la jurio, gvidita de Luc Besson, doni al *Rozeto* la premion por la plej bona reĝisorado aspektas absolute prava kaj merita.



Sed, malgraŭ la ĝenerala tendenco, la ĉefpremio ricevis la venezuela filmo *Hermano* (Frato), kiu rakontas pri la nuna tempo kaj estas absolute eksterpolitika. En Karakaso loĝas du fratoj — Julio kaj Daniel. Iutage Daniel vidas, ke amiko de Julio per hazarda pafo mortigas ilian patrinon. Daniel nenion diras al Julio. *Frato* estas pri savo kaj mortigo. Pri ludo kaj pri vivo. Pri forto kaj malforto. Pri amikeco kaj perfido. Inter ĉi tiuj absolute malsamaj nocioj ekzistas limo, kiu ne ĉiam estas evidenta kaj klara. Alia avantaĝo de la filmo estas bonkoreco kaj ironio — malgraŭ la teruraj okazintaĵoj, post la fino oni sentas entuziasmon kaj vivodeziron. *Frato* estas elstara filmo.

Dum la konkurso estis montritaj multegaj bonaj filmoj (kaj ekster ĝi — multe pli).

La festivalon malfermis *Ces amours-la* (Tia amo; internacia titolo — *Virino kaj viroj*) de la kinopatriarko Claude Lelouch. Sendube, se ĉi tiu filmo partoprenus la konkurson, ĝi ricevos ĉiujn premiojn, sed ve — *Virino kaj viroj* estis montrita en Moskvo nur unufoje. Kontraŭe la ferma filmo, *Eksterordinaraj aventuroj de Adel*, nova laboraĵo de Besson, jam baldaŭ post MIKF estis vaste montrita tra la lando.


Pleniĝu via menso

Verda Disco: KD / Tradukis el la pola Przemysław Wierzbowski. Białystok: [s.e.], 2009.

“Insulo de kulturo” en la Zamenhofa naskiĝurbo Białystok kaj aliaj fortoj eldonis pasintjare, cetere el la urba buĝeto kaj kiel “senpagan suplementon al *Gazeta Wyborcza*” eble neniam antaŭe spertitan muzikprojekton kun la defietita titolo *Verda Disco*, eble alude al populara muzikstilo el la 1980aj jaroj. La muzika lumdisko sin nestas en modesta kartona ujo gaje-bunte ilustrita okaze de la jubilea UK tie. Estas eklektika kolekto da pecoj far polaj bandoj, evidente speciale aranĝita porokaze en Esperanto, kiu plejparte sonas en 16 kantoj. Sur la koverto mi trovas la fieran “Podlaĥio verkas en esperanto” — kiel mi divenas, temas pri geografia nomo.

Ĉiun titolon akompanas ligilo al koncerna retpaĝo, kio stimulas al esploro pri la novaj kulturtavoloj kiuj invadis Esperantujon. Kaj vere, vi povas trovi abunde da kromaj informoj tie — pri la plenumantoj, kun detaloj tekstaj, bildaj kaj videaj. Iujn ligilojn mi plezure konservis por posta sekvado (nur unu ligo intertempe malvalidiĝis).

De la unuaj sekundoj de via aŭskultado vin atakas aroga, *industria, tehno*-peco agrese aroga kaj energia far *Red Emprez* “Tiom sola”, kiu tuj humurigas vin pri io vere eksterordinara, kaj intrigas pri pluo. Vi apenaŭ ion komprenas tekste (serĉo de ĉi kaj ceteraj tekstoj rete



ne sukcesas), sed tio ne gravas — eblos streĉiĝi poste!

En mia juneca tendara esperantujumo (kiam ĉe la lignofajro sonis nur simplaj gitarakordoj kaj sinceraj, sed ofte tiom mallertaj voĉoj) mi ĉiam strebis al kaj aprezi provojn profesie muziki. Ĉi sento verŝajne ĉiam estos kun mi kiel certa indikilo pri Esperanta muziko. Kaj jen mi plu aŭskultas kaj trovas brilegan bluson “Flugu kun mi” de *Devil Blues*. Ĉu mi regurdu la banalajon ke ne nur la angla lingvo taŭgas por la stilo? Mia intereso jam kreskis enorme.

Plu sekvas diversstilaj pecoj — far la grupoj *Bolo Young* “Amikoj” (kun refreno “Ĉio fia, ĉio fi...”) — malsarena kaj elokvente preciza blusrok-balado kun absolute despera humoro kaj pura ina vokalo kaptaj; *Schody* [Ŝtuparo] “Nur mantelo” — eble tro elementaj harmonie kaj akcentaj nur en-sin-koncentriĝa manifestiĝado de iuj energioj, kiujn la aŭskultanto evidente divenu el la rapida ritmo kaj sinsekvo rapida de la akordoj, kun distordita tembro; kaj jen vi plu falas en laŭ iuj “veran” muzikon rubmetalan kiam gravas nepre senmelodiaj voĉadoj raŭkaj — mi povas aprezi la lertecon gitaradan, sed mi preferu ke oni tordusian realecon sen mi.

Daŭre, jam io alia — mi ĝojas denove iom aŭdi la tekston de ĉi hiphopa peco “Demarŝe” de *Cira&Nikon* gaste *Hukos*: “La hiphop-kontraŭuloj estos malvenkintoj!” — penas min konvinki la energia voĉo. Nu, la slogano ne inspiras min, eĉ ne amuzas, dum mi rimarkas ke mi nevole piedfrapas kaj korpon movas laŭ la ritmo. Mi volonte kredus ke la muzikistoj mem volas kredi ke hiphopo kontribuos al la Esperanta Afero. Mi nepre trastudu la tekston, eble mi ion pli komprenos. Sed kiel precize ili vortumas en Esperanto!

Zerova “Nenomita loko” — trankvila monotona balado kun recitado kvazaŭ eltelefono kaj kantado mistone, kun

evoluanta akompano impresas antaŭŝtorme kaj morne. La pecon sekvas iom simila humore sed pli energia monotona “Danco” de *Sami Myzycy* gaste *Diana Giurow* — permesu al vi dancon kaj dro-non en senpenson; kaj vera animkrio de *Rima* “Iluzi” finiĝas — rubmetala. Sed ĝi ne tiom trafas min kiom la sekvanta “Malsekura” de *Zero-85* — brila multvoĉa malsarena, komplikharmonia, energia bombo. Eble la plej forta en la albumo.

Sed jen la sekvantaj tri — “Interna knabino” (de *Bright Ophidia*) — ŝoka roka balado frapa — kun kaptaj gitaraj partoj kaj tre klara teksto kiun ŝire elkor-igas la kantisto; klasikec-opereca “La Aŭtuna” de la duopo *Milka & Chociei* — nun pleje ŝatata de mi; kaj U2-eca “Humiligu min” de *Emptv*.

La diskon kronas energia, virtuoza kaj konvinka “Vi estas” de *5set5*, “Kie nun estas?” de *Złodzieje Rowerów* — “progresemeroke” pezmetala; kaj “Naskiĝfesta kanto” de *My a* — kvazaŭ lulkanto kun recitado — “Silente sidante dum longaj horoj”...

Sendube la farintoj sukcesis en la strebo krei ponton inter popoloj per montrado de multkultureco de sia regiono Podlaĥio — pruvo ke Esperanto plu sin ekspansias al diversaj kulturaj areoj. Nu, ne ĉiam mi trovas harmonion inter la tekstoj (kiujn mi ne ĉiam komprenas sen speciale streĉiĝi), la muzikaj ideoj (kiuj iam ŝajnas meĥanike transmetitaj el la senvaloraj amas-kulturaj produktoj), kaj la plenumado (sed vere, ofte tre tuteca, lerta). Pri la kanzontemoj diskuti eble ne indas — ĉiuj ja elektas ĉion por si — ĉu la plenumantoj intence frandas la humoron de soleco? La morna aspekto dominas, sed ne nepre despera. Vi havas strangetan emon denove ion ŝalti kaj droni almenaŭ por iom, en la kreaĵo de niaj bravaj samtempuloj-samlingvanoj-samteranoj.

Kaj ne gravas ke iam, sekve la ritmon kanzonan, tiu aŭ alia plenumanto ne tre strikte sekvas la akcentajn kaj vokalajn regulojn prononcajn kaj ke la vorto “sia” ne uzeblas kun la dua persono...

Iuj aprezos la kolekton taŭga fonmuzikaĵo. Iuj plezure sin tordos dance je la koncernaj ritmoj. Cetere, ĉiam pretu stumbli surprizete je freŝa akordo aŭ ludlertaĵo. La ĝenerala impresado estas... pleneco — da muzikaj ideoj, tembroj, ritmoj, stiloj. Sendube vi sekvas certan modon kiu plenigas vian atenton kaj menson. Sed ĉu longaj horoj restas por nia sidado silenta dronaŭskulta?

Andrej Peĉonkin



Nova libro pri Zamenhof

Künzli, Andreas. *L.L. Zamenhof (1859-1917). Esperanto, Hillelismus (Homaranismus) und die "jüdische Frage" in Ost- und Westeuropa* [L.L. Zamenhof (1859-1917). Esperanto, hilelismo (homaranismo) kaj la "juda demando" en orienta kaj okcidenta Eŭropoj].



L.L. Zamenhof, apartenanta al la historio antaŭ ĉio kiel la aŭtoro de Esperanto, estas malpli konata kiel teoriisto de la "juda demando". Naskita kiel orienteŭropa judo, li suferis en multaj rilatoj humiligojn, diskriminacion kaj nacian ŝovinismon. Li devis sperti, ke la homoj malamas, malrespektas kaj turmentas unu la aliajn, nur ĉar ili sentis sin aparteni al alia popolo, do parolis en alia lingvo kaj konfesis alian religion. Kiel reprezentanto de popolo, kiu vivis en diasporo ekde du jarmiloj, kiu estis senigita de siaj rajtoj kaj ĉiam denove estis kruele persekutata, Zamenhof, por solvi la "judan demandon", venis al la ideo krei per Esperanto novan lingvon kaj per la hilelismo/homaranismo novan religion por la judoj,

por percepti ĝin samtempe kiel "tuthomaran etikon".

Diference de la ĝis nun aperintaj Zamenhof-biografioj, la aŭtoro de ĉi tiu libro Andreas Künzli pli altgrade enfokusigas en sian studon la judan dimension ĉe Zamenhof, kiu estas absolute centra ĉe li, kaj do pli forte atentigas lian judecon, kiu estis ĝis nun iom neglektata, kaj la efikojn al lia pensado kaj agado. Tiel, 150 jarojn post la naskiĝo de Zamenhof, lia vivo kaj verkaro do estas, en la senco de lia kontribuo celata por solvi la "judan demandon", science prilaborataj surbaze de ampleksa fontaro kaj en vasta historia kunteksto. La kerna dokumento en la apendico koncernas la publikigon de la Zamenhofa hilelismo el la jaro 1901, kiu nun ekzistas unuafoje en germana traduko.

"Spegulo", Somero 2010

La ses-paĝa redakcia mesaĝo en la somera *Spegulo* estas dediĉita al UEA: membro-statistiko, abonombroj, aliĝoj al la Kuba UK, funkciado de la komitato kaj la furor-listo de la libroservo. En la rubriko *Solidaraj kun Kubo* aperas resuma politika raporto pri la jaroj 1989–2010 kun listo de retejoj pri kubaj politikaj aferoj kaj homaj rajtoj. Sekvas biografio de Fidel Castro Ruz titolita *La historio ne plu absoluta lin*.

Per kompilo kaj traduko de Tomasz Chmielik aperas la unua parto de *La Katyń-raporto*, en kiu estas prezentitaj fragmentoj de atestaĵoj pri tiu tragedio. Ĉi tiun temon daŭrigas la versaĵo *Aŭgusto 1940* de Anna Aĥmatova en la traduko de Kris Long. La dua parto de la studo *Kun firmaj ideoj kaj ardaĵoj diskutoj* de Andreas Künzli ampleksas la jarojn 1955–2001 en la historio de UEA per ĝia revuo *Esperanto*.

En la bibliografia rubriko estas prezentataj du libroj aperintaj okaze de la UK en Bjalistoko: *Ĉio komenciĝis ĉe la Verda. Pri Ludoviko Zamenhof, lia familio kaj la komenco de Esperanto* de Zbigniew Romaniuk kaj Tomasz Wiśniewski kaj la reeldono de *Babiladoj de bonhumora Zamenhofano* de Jakobo Ŝapiro.

Halina Gorecka

Ricevitaj gazetoj

EAB Update, 2010/50; Esperanta Finnlando, 2010/3; Esperanto aktuell, 2010/3; Esperanto en Azio, 2010/68; Esperanto en Danio, 2010/3; Esperanto sub la Suda Kruco, 2010/102; Esperanto, 2010/6,7-8; Ĝenerala Informilo, 2010/162; Heroldo de Esperanto, 2010/7; Informa Bulteno, 2010/2; Informilo por Interlingvistoj, 2010/71; Informilo, 2010/7-8; KAE-Informilo, 2010/71; La Arĝenta Gruo, 2010/1,2,3,4; La Movado, 2010/712,713; La Ondo de Esperanto, 2010/7; La Pacifika Kuriero, 2010/1; La Revuo Orienta, 2010/6; La Sago, 2010/64; Litova Stelo, 2010/1,2; Lumo, 2010/1; Monato, 2010/6,7; Norvega Esperantisto, 2010/3; REGo, 2010/3,4; Scienco kaj Kulturo, 2010/3,4; Spegulo, 2010/2; Tempo, 2010/106; Usona Esperantisto, 2010/4.

La kvina "Cejano"

Cejano estas nacia estona floro. La samnoman almanakon eldonas ekde 2003 la Tartua Esperanto-Societo. La 5a kajero sur 80 paĝoj enhavas kelkajn sekciojn. En *Dokumentoj* aperas mesaĝo de la ĝenerala direktoro de Unesko pri la Internacia Jaro de Lingvoj 2008, rezolucio de la Ĝenerala Asembleo de UN pri la Internacia Jaro de Akordiĝo 2009 kaj informo pri la inaŭguro de Esperanto-Centro en Bjalistoko.

La sekva sekcio estas *Interlingvistiko. Esperantologio. Historio*. Ĝin malfermas informoj pri la konferenco *Internaciaj lingvoj en kunteksto de eŭro-lingvistiko kaj interlingvistiko* (Tartu, 2009). Detlev Blanke precizigas pri *La epizodo Weltdeutsch kaj Wilhelm Ostwald*. Enn Ernits kontribuas estonlingvan artikolon pri la bengala esperantisto Lakshmiswar Sinha, kiu faris kvarmonatan prelegvojaĝon en Estonio fine de 1930. Ankaŭ estonlingve Ott Kurs rakontas pri la renaskiĝo de Esperanto en Tartu en 1956. Dek unu paĝojn okupas tezoj *Estonio de Soveta Unio al Eŭropa Unio* de Madis Linnamägi por la prelegvojaĝo en Francio en 2005.

La sekcio *Personoj. Esperanto kaj mi* estas grandparte dediĉita al la fama slavisto kaj interlingvisto Aleksandr Duliĉenko, kiu en majo 2009 ricevis honoran doktorecon en la universitato de Trier (Germanio). Lia festprelego pri mikrolingvoj aperas germanlingve.

En la literaturaj paĝoj aperas versaĵoj kaj anekdotoj. La sekcio *Kulturhistorio* enhavas artikolon pri la religia centro de baltaj gentoj Romuva. La kajero havas ankaŭ aliajn movadajn kaj kulturajn informojn kaj 16 paĝan kolorfotan suplementon en la fino.

Halina Gorecka

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Al la junia tasko *Diagonaloj* venis dek tri respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Jadwiga Benicka, Dorota Burchardt, Stanisław Płachta, Hanna Skalska, Zbigniew Tytkowski (Pollando), Klara Ilutoviĉ, Svetlana Konjašova, Nikolao Neĉajev (Ruslando), Roland Larsson (Svedio).

La loto donis libropremion al **Klara Ilutoviĉ**. Ni gratulas!

La ĝustaj respondoj. *De supre dekstren:* 1. Venus'; 2. poker'; 3. sider'; 4. valet'; 5. Havan'; 6. gitar'; 7. limon'; 8. cunam'; 9. renom'; 10. rat'; 12. ran'. *De supre maldekstren:* 2. per; 3. sonat'; 4. vikun'; 5. Hades'; 6. galer'; 7. liver'; 8. citat'; 9. ruman'; 10. tenor'; 11. banan'; 13. Rom'.

Malnovaj taskoj

Ni proponas al via atento faskon da taskoj, publikigitaj en *La Ondo de Esperanto* antaŭ cent jaroj.

1. Dio neniam renkontas ĝin, la reĝo iafoje renkontas ĝin, kaj la vilaĝano ĉiam renkontas ĝin.

2. O.

3. --- pa--- donis al almozulo -----n.

(Metu anstataŭ strekovicoj la samajn literojn.)

4. Kiam leporo alkuros en la mezon de arbaro, kion li faros?

5. Ĉiu min malamas; ŝanĝu en mi la kvaran leteron — ĉiu min ekŝatos.

6. Kiun signon oni devas meti inter 2 kaj 3 por ricevi nombron, kiu estas pli granda ol 2 kaj malpli ol 3?

7. Kiu parolas ĉiujn lingvojn de la mondo?

La respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 10a de oktobro 2010.



Anekdotoj el Pollando

— Maria, vi post unu litro da vodko aspektas kiel belulino!

— Petro, ĉu vi frenezigiĝis?! Tio estas mi, Marko!

Edzino: Karulo, morgaŭ estos jubileo de nia geedziĝo. Kiel ni solenos ĝin?

Edzo: Eble per minuto de silento.

Akuŝistino proksimiĝas al la atendanta patro kun tri novnaskitaj beboj sur la brakoj:

— Ĉu vi ne timas pro tiom da infanoj?

— Ne, — respondas la patro.

— Doprenu ilin, mi tuj kuros por alporti la sekvajn.

Tradukis membroj de la Esperanto-Klubo Olsztyn

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Kaj la ceter', nur turo

Humphrey Tonkin... Liaj erudiciaj kontribuoj al la angla literaturkritikado estas konsiderindaj... (Baldur Ragnarsson. *Humphrey Tonkin, tradukinto de Shakespeare // La arto labori kune*: Festlibro por Humphrey Tonkin. Red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins. Rotterdam: UEA, 2010, p. 720)

Frandu Ŝek-piron, aŭ: La piro de l' pasio...

Ŝekpiraj dramoj... (samloke, p. 721)

Transmorta kunlaboro, aŭ: Vi povas morti nur dufoje

Kiuj jam pli ol dekojn da jaroj laboras kun la mortinta prezidanto Eyadema, asertadis: "La kutimoj pluestas. Ili neniam ŝanĝiĝas". (Komunikoj de Afrika Centro Esperantista, KomACE 41, red. Cophie Parphes, 13 maj 2010)

Eta murdemo

Mi iomete estu eksterma. (Gbeglo Koffi: La hejmon faras kaj malfaras la virinoj, 23 jul 2010, www.liberafolio.org/2010/kriantoj-defendis-la-redaktoron-de-la-revuo-#1279883090)

Civitaŭ lingvaŭ

En Sankta Paŭlo de Ordalo mem mankaŭ publika biblioteko. (HeKo 443 1-A, 30 jun 2010, www.esperantio.net/index.php?id=1353, stato 28 jul)

Ĝi pli ol malsatmortu, aŭ: La verda hungro

Hodiaŭ ne sufiĉas diri ke nia unua celo estas disfastigi esperanton... (Ileana Schröder, 28 jun 2010, groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5709)

Post la fasto, venas vasto

Mi kore gratulas la vjetnamajn esperantistojn pro la UEA-decido pri la 97-a UK. Tio estas rezulto de longa laboro kaj penado de vastaj vjetnamaj samideanoj. (Guojiang Wu, 14 jan 2010, groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/14361)

Instali akuzativon

Vi uzas nuntempe Firefox 3.5.8. Pro sekurecaj kialoj ni rekomendas la instaladon de la lastan kaj plej bonan version. (eo.www.mozilla.com/eo/firefox/3.5.8/whatsnew, stato 28 jul 2010)

Ju ek, des fin

Ĉu vi scias, ke eblos lerni la finnan tiel, ke vi povas vin esprime en tiu lingvo juek denaska finno? (Rafel' Despradel // *Havana Kromkaravano*, n-ro 0, 25 jul 2010, p. 1.)

Plukis István Ertl

Se vi scias kaj ŝatas kompili enigmojn, ŝaradojn kaj aliajn konkurstaskojn, vi estas bonvena kiel kunlaboranto de *Mozaiko*. Ni invitas ankaŭ karikaturistojn kaj humoristojn. Anoncu vin ĉe la redakcio.



E-Senco, Kultur-Socia Societo en Poznań invitas legantojn de *La Ondo de Esperanto* partopreni la 26-ajn **ARTajn KONfrontojn en ESperanto ARKONES**. ARKONES-26 ĉi-jare okazos 24–26 sep tuj post la studsesio de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz. La aranĝon aŭspicias UEA kaj ĝia junulara sekcio TEJO.

La programo denove abundos je muziko, spektakloj kaj prelegoj. Ĉi-jaraj muzikaj steluloj estas la folka *Kapriol!* kaj la elektronika *SoloTronik*. Ambaŭ delonge ne koncertis en nia parto de Eŭropo, do des pli indas veni.

“UM JE UME, UM EN JEE” — sub tiu enigma titolo kaŝiĝas nova verko de Jarlo Martelmonto, kiun li preparis speciale por ARKONES. Apartan repertuaron prezentos ankaŭ la kabaredo *La Oraj Pantalonoj en Arbustoj*.

Krom la spektakloj kaj koncertoj partoprenindaj estas prelegoj, kies temoj tuŝas ne nur arton sed ankaŭ lingvistikon, lingvan politikon kaj Esperanto-movadon.

Nia movado evoluas ankaŭ danke al noktaj diskutoj kaj koridoraj renkontiĝoj. Tio certe ne mankos en Poznań. Eblos ankaŭ facile viziti pitoreskan urbocentron aŭ efike elspezi en la libroservo. Plenan kaj daŭre kreskantan programon vi trovos en la retejo.

Post la dekjara gastado de ARKONES en la lernejo *Lejery* la Konfrontoj okazos en nova loko, en la koro de Poznań, inter la muroj, kiuj jam akceptis esperantistojn, i.a., dum la Internacia Fervojistista Kongreso.

Aliĝu ĉe <http://arkones.org/partopreno/aligilo>

☎ +48-509-400-317 (Tobiasz Kaźmierski)

✉ Paweł Janowczyk, ul. Bielska 13A, PL 61-435 Poznań, Pollando.

<http://www.arkones.org>

<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

Bonvenon!




Germanio. Fine de julio la Esperanto-urbo Herzberg akceptis kadre de SALO-5 lernejanon el la pola ĝemelurbo Góra, kiuj kune kun germanaj lernejanon lernis Esperanton antaŭtagmeze sub la gvido de Zsófia Kóródy kaj André Müller, kaj posttagmeze amuziĝis kaj ekskursis, interalie, en Goslar. (*ICH*)



Benino. La neregistara organizo Afrika Centro Mondcivitana (ACM) organizas instruadon de Esperanto en rifuĝejoj kaj ofertas regulajn kursojn en la centro mem. Komence de aŭgusto startis nova kurso kun dek aliĝintoj, kiuj havis 15 lecionojn kaj fine ricevis Esperanto-donacetojn. (*François Hounsounou*)




Israelo. En la Tel-Aviva strato Zamenhof, ĉe la angulo de la strato King George, malfermiĝis eta kafejo *Esperanto*. Ĝiaj junaj posedantoj metis la bildon de Zamenhof sur la muron kaj sur la menuon. Sur la foto estas ELI-membrino Jael Ŝelaĥ en la nova Zamenhof-strata kafejo *Esperanto*. (*Amri Wandel*)



Aleksander Korĵenkov. *Zamenhof*
 Serio *Scio*, Volumo 9
 64 paĝoj, 6 eŭroj



Arthur Conan Doyle. *La ĉashundo de la Baskerviloj*
 Serio *Mondliteraturo*, Volumo 6
 168 paĝoj, 15 eŭroj



Dek libroj / Kompilis Aleksander Korĵenkov
 Serio *Nia Trezoro*, Volumo 1
 32 paĝoj, 4,50 eŭroj



Dek gazetoj / Kompilis Aleksander Korĵenkov
 Serio *Nia Trezoro*, Volumo 2
 32 paĝoj, 4,50 eŭroj